


中國報通

EL POPOLA

CINIO



Solena festado de la 40-jara jubileo de EPĈ

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de EPĈ-raportistoj

La te-kunveno por la 40-jara jubileo de "El Popola Ĉinio"





(De dekstre): Lin Wusun, direktoro de la Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo; Chai Zemin, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj; Hu Sheng, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, Nishikawa Toyozo, estro de la komuna karavano de japanaj-koreaj esperantistoj al Ĉinio; Chen Yuan, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL); kaj Tan Xiuzhu, vicĉefredaktoro de la redakcio de EPĈ kaj vicprezidanto de ĈEL



S-ro Liu Deyou (meze), vicministro de la Kultura Ministerio de Ĉinio, s-ro Nishikawa Toyozo kaj Yang Yunyu, membro de la societo "Amikoj de Esperanto"



40-JARA JUBILEO DE «EL POPOLA ĈINIO»



Veterana esperantisto Zensto (dekstre) kaj Liu Ling (la dua de dekstre), aganta ĝenerala sekretario de ĈEL


(De maldekstre): Hou Zhiping, vicestro de la redakcio de EPC; Liu Zhen, vicsekretario de la Partia Komitato de la urbo Qingdao; Tan Haosheng, ĉina sciencisto kaj membro de la societo "Amikoj de Esperanto"; kaj ties edzino Deng Tuanzi

“El Popola Ĉinio” fondiĝis kun la helpo de s-ro Hujucz, pioniro de la ĉina E-movado. Ĝi travivis jam 40 jarojn.

Por celebri ĝian 40-jaran jubileon, ĝia redakcio okazigis te-kunvenon posttagmeze de la 24-a de majo en la Halo de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco en Pekino.

370 personoj ĉeestis la te-kunvenon. Inter ili estis Hu Sheng, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj kaj vicprezidanto de la societo “Amikoj de Esperanto”; Liu Deyou, vicministro de la Kultura Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko; Chai Zemin kaj Chen Haosu, vicprezidantoj de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj; Jejezo, honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo; Chen Yuan, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL); famaj veteranaĵ esperantistoj; malnovaj ko-

Franca esperantistino s-ino Zorka Enizan (maldekstre) kaj ĉina esperantistino



legoj, kiuj iam laboris en la redakcio; kaj esperantistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj personoj de Pekino. La festkunvenon ĉeestis ankaŭ s-ro Yosimi Umeda, eksvicprezidanto de UEA, komuna karavano de japanaj-koreaj esperantistoj al Ĉinio honore al la 40-jara jubileo de "El Popola Ĉinio", franca esperantista karavano estrata de s-ino Z. Enizan, jugoslava samideano Davor Štimec, kaj lia amikino kaj aliaj samideanoj el Belgio, Sovetunio, Pollando kaj Svedio.

Antaŭ la te-kunveno en la ripozĉambro la 72-jara Hu Sheng forte manpremis kun Zhang Qicheng, unu el la fondintoj de EPC, por esprimi gratulon. Li diris, ke EPC bone raportis pri la nuna reformado kaj konstruado de Ĉinio kaj gajnis por Ĉinio pli kaj pli multajn amikojn en diversaj lokoj de la mondo. Li ĝojis, ke la ĉinaj esperantistoj havas tiun revuon. Jes, EPC estas revuo de ĉiuj esperantistoj kaj ĉiuj amikoj, kiuj subtenas kaj zorgas ĝin. Ĝuste pro tio, antaŭ la festado la redakcio de EPC ricevis gratulajn mesaĝojn, leterojn kaj telegramojn, pentraĵojn, kali-

grafaĵojn kaj aliajn donacojn.

Je la 2-a ptm. komenciĝis la te-kunveno. S-ino Tan Xiuzhu, vicĉefredaktoro de la redakcio, faris paroladon. En la nomo de la redakcio ŝi varme bonvenigis kaj kore dankis la gastojn.

Retrorigardante la iritan vojon de EPC, ŝi ŝuldis la sukceson de la revuo al la ĉina registaro pro ĝia kompreno kaj favoro al Esperanto kaj E-laboro kaj diverslandaj amikoj, perantoj kaj legantoj pro ilia kunlaboro kaj helpo.

EPC estas unu el la plej fruaj fremdlingvaj revuoj de Ĉinio kaj ankaŭ la plej aĝa kaj plej influa Esperanta revuo en la historio de la ĉina E-movado. En la pasintaj 40 jaroj la revuo atingis 142 landojn kaj regionojn. En la lastaj jaroj la redakcio ĉiujare ricevis preskaŭ 2 000 leterojn de legantoj el pli ol 70 landoj. La legantoj laŭdis, ke EPC estas "fenestro por koni Ĉinion" kaj "ponto por pliigi amikecon".

Liu Deyou kaj Chen Yuan donis salutvortojn.

La kunvenon salutis ankaŭ s-ro

Nishikawa Toyozo, estro de la komuna karavano de japanaj-koreaj esperantistoj, kaj s-ino Z. Enizan, estro de la franca karavano. S-ro Nishikawa Toyozo laŭdis la sintenon de la ĉina registaro al Esperanto. Li opiniis, ke EPC estas tre alloga Esperanta revuo. Li emociie esprimis estimon al la laborantoj de la redakcio de EPC.

En la te-kunveno estis voĉlegitaj gratulaj mesaĝoj de la estraro de UEA, s-ro Bakin, honora prezidanto de ĈEL kaj prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, kaj aliaj.

Vespere de tiu tago la redakcio invitis diverslandajn gastojn al bankedo. Iuj el ili faris parolon kaj donis al la redakcio donacon por esprimi sian amikecon al la ĉinaj samideanoj.

La te-kunveno, bankedo, internacia vespero kaj vojaĝo okazintaj dum la festado havigis al ĉinaj esperantistoj bonan ŝancon por kontakti kaj amikiĝi kun diverslandaj esperantistoj kaj al la redakcio bonan ŝancon por aŭskulti opinion, konsilon kaj peton de legantoj.

En tiuj tagoj mi konatiĝis kun

lamaj kaj nunaj estraranoj kaj raportistoj de la redakcio de EPC



40-JARA JUBILEO DE «EL POPOLA ĈINIO»



(De maldekstre): Davor Štimec, Chun-Chan Yeh, vicprezidanto de ĈEL, kaj Chen Haosu, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj

Li Yuping (la dua de dekstre), vicprezidanto de ĈEL, kaj alilandaj esperantistoj

La honora prezidanto de ĈEL s-ro Jelezo (la tria de maldekstre) salutas sian amikon.



Gastoj skribas sian nomon.


Gastoj en la ekspozicio de Esperantaj libroj kaj gazetoj

S-ro Yosimi Umeda (la dua de maldekstre), Chen Yuan (la tria de maldekstre), Zhang Qicheng (dekstre) kaj Tan Xiuzhu






Fotado de la sceno



S-ino Tan Xiuzhu kaj belgaj gastoj ges-roj Walter




franca samideano s-ro Hervouet André kaj lia edzino. Li abonis EPC jam de ĝia unua numero kaj legis preskaŭ ĉiujn ĝiajn artikolojn. Ankaŭ liaj filino, bofilo kaj genepoj estas esperantistoj. Li diris, ke en la komenco la papero de EPC estis ne bona, sed nun multe pliboniĝis. Li ĉiam kunportas la revuon. En aŭtobuso kaj stacio de subtera trajno li konigas Ĉinion al pasaĝeroj, precipe al junuloj. Li havas korespondajn amikojn en diversaj lokoj de la mondo kaj 48 lernantojn. Oni nomas geedzojn Hervouet semantoj de Esperanto.

S-ro Nishikawa Toyozo estas prezidanto de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj de Japanio kaj peranto de EPC. Por multigi abonantojn, li konsilis, ke unue oni devas ofte publikigi opinion, esperon kaj peton de legantoj, due oni devas ĝustatempe skribi al la abonantoj, kiam ilia abona tempo baldaŭ finiĝos, por ke ili sentu intimecon kaj reabonu la revuon, kaj trie la ĉinaj esperantistoj de-



Renkontiĝo de japana kaj sovetia esperantistinoj



Surbrustigo de insigno por la 40-jara jubileo de "El Popola Ĉinio"

vas korespondi kun samideanoj de multaj aliaj landoj.

Mi kune kun jugoslava samideano Davor Ŝtimec kaj lia amikino vizitis la Imperiestran Palacon, la Someran Palacon kaj la Grandan Muron kaj ni fariĝis bonaj amikoj. Li diris, ke li tre ŝatas Ĉinion kaj interesigas pri artikoloj de EPC pri la viv- kaj pensmanieroj de ĉinoj. Li kaj lia amikino unufoje partoprenis tiel grandan kaj solenan kunvenon kaj trovis ĝin interesa. Ili pasigis belajn plezurajn tagojn en Pekino.

La 40-jara jubileo de EPC estis momento por retrorigardi la pasintcon kaj plani la estontcon.

S-ino Tan Xiuzhu, en la nomo de la redakcio, esprimis: "En la estonteco ni pli modeste aŭskultos opiniojn de niaj legantoj por senĉese plibonigi nian laboron. Ni estas plenaj de memfido fari nian revuon versence unuaklasa Esperanta revuo."

Gaja internacia vespero

Teksto de **DA WEI**

Fotoj de EPC-raportistoj

*En la mondon venis nova
sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.*

...
La kantado de "La Espero" malfermis la internacian vesperon.

Pluveto freŝigis la aeron de la frusomera Pekino. Vespere de la 25-a de majo festa etoso regis en la Halo de la Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco en Pekino. Por celebri la 40-jariĝon de la gazeto "El Popola Ĉinio", pli ol 250 esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj oklandoj okazigis tie internacian

vesperon.

Tuj post kiam la prezidanto de la vespero s-ino Tan Xiuzhu, vicĉefredaktoro de EPC, anoncis, ke la unuan programeron "La Espero" prezentos laborantoj de la redakcio, ekvarmigis la etoso. Ĉu pro emocio post aŭdo de la nomo "La Espero", ĉu pro tio, ke ili volis esprimi la saman volon al Esperanto, kiel la laborantoj de la redakcio de EPC, aro da esperantistoj elpaŝis kaj partoprenis en la ĥoro. Inter ili estis parolistoj de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino, studentoj de la Esperanta kurso de la Pekina Radia Instituto, 80-jara s-ro Nishika-

wa Toyozo, estro de la Japana Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG), kaj nia malnova franca leganto s-ino Hervouet Denise. Kun la akompano de la orkestro el la artistoj de la Centra Opera Teatro kaj la Pekina Kanta-danca Ensemblo la ĥoro multe sukcesis kaj estis longe aplaudata de la ĉeestantoj.

Post kelkaj programeroj, la orkestro ekludis valson. Tio estis speciala aranĝo de la prezidanto de la vespero. Iuj ĉeestantoj ekdancis laŭ bela melodio. Aliaj libere interparolis, te-trinkante.

S-ro Yosimi Umeda, eksvic-

prezidanto de UEA, prezidis la vesperon kune kun s-ino Tan. Per siaj humuraj vortoj li multe vigligis la atmosferon. Sub lia lerta instigo gastoj el Japanio, Koreio, Sovetunio k.a. prezentis programerojn en la vespero.

Or-hara Tatjana Petuškova, veninta de Sovetunio, estis kapabla en multaj flankoj. Ŝi kaj ludis gitaron kaj kantis la popolan kanton "Su-

Muzikludo



40-JARA JUBILEO DE «EL POPOLA ĈINIO»



Kantado de "La Espero"

Alianda esperantisto antaŭ prezentado de pup teatro



Junaj esperantistinoj en dancado





La duopa danco "Ĉu?"



Kantistino en prezentado

Ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj en danco





Ce la finiĝo de la internacia vespero

liko” de Sovetunio kaj la italan kanton “Sankta Luĉio”. Ŝia prezentado ravis ĉiujn ĉeestantojn.

Jam de la komenco de la vespero, s-ro Nishikawa Toyozo altiris al si la atenton de la ĉeestantoj. Li estis la plej aĝa kaj plej vigla el la eksterlandaj gastoj. Svingante sian brakon, de tempo al tempo li laŭte parolis kaj kantadis kun emocio. Nemalfacile videblis, ke tio venis de lia amo al Esperanto kaj al EPC. Kvankam li ne havas tre belan voĉon, tamen kiam li kantis ĉinan kanton “Er’langshan-monto” en la ĉina lingvo, la tuta halo estis forte infektita de lia pasia kantado kaj pretervole akompanis lin per takta aplaŭdado.

La vespero prezentis grandan scenejon, sur kiu la ĉeestantoj rolis kaj kiel aktoroj kaj kiel spektantoj. Post gaja dancado, la ĉeestantoj denove aprecis la prezentadon de la artistoj.

Duopa danco “Ĉu?” prezentis amhistorion de geamantoj. En la danco oni provis esprimi la naciajn senton kaj stilon per


baletoj. Tial tio povis esti nomata ĉina moderna baletoj.

Soldanco “Kolora Skulptaĵo de Dunhuang” estis pure ĉinstila. Dancistino, en bela nacia kostumo, kun nudaj piedoj, delikate reaperigis la dancajn pozojn de feinoj en la freskoj de Dunhuang en okcidenta Ĉinio. La en- kaj eksterlandaj gastoj kun granda intereso fotadis ŝin.

Deklamado de poemo “Akrostika odo” de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino estis interesa. Ĝi enhavis kvar strofojn. Ĉiu strofo komenciĝas per “El Popola Ĉinio” kaj la unua litero de ĉiu verso formas la titolon “El Popola Ĉinio”. La poemo laŭdas, ke EPC rolas kiel amikeca ponto inter la esperantistoj de ĉiuj landoj.

Ĉiuj programeroj, dancoj kaj kantoj estis sinceraj oferaĵoj al la 40-jariĝo de EPC.

La internacia vespero estis baldaŭ finiĝonta. Ĉiuj starigis kaj entuziasme kantis hore “La Espero”. La bela melodio de “La Espero” elflugis tra la fenestrojn de la halo al la nokta ĉielo supren kaj supren... ■



Gratula letero de UEA

Gratula letero de s-ro Bakin, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio kaj honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo

Gesamideanoj de la redakcio de "El Popola Ĉinio",

Dankon pro via telegramo! Kun ĝojo mi informiĝis, ke vi festas la 40-jaran jubileon de "El Popola Ĉinio". En la pasintaj 10 jaroj mi regule ricevis vian revuon. Kvankam mi ne povis legi ĉiujn artikolojn pro malsano, tamen mi estis tre ĝoja, kiam mi foliumis ĝin, kaj sentis, ke mi intervidiĝas kun malnova amiko. Dum la 40 jaroj la revuo havigis al si legantojn en ĉiuj mondpartoj kaj donas influon pli kaj pli grandan. Pri tio fieras ni, ĉinaj esperantistoj. Tio estas ankaŭ frukto de la diligenta laboro de la redakcio kaj estas tre gratulinda.

Pardonu, ke mi ne povas ĉeesti la jubileon pro mia longtempa malsano. Por mi estas malfacile piediri kaj skribi pro la debila mano. Tamen mia koro batas ĉiam samtakte kun la viaj kaj viaj koroj varmas en la mia. Mi volonte dediĉos mian etan forton al la plua disvolviĝo de la ĉina Esperanto-movado.

Gesamideanoj, akceptu la festan saluton de mi, maljuna esperantisto.

Bakin
La 20-an de majo

Karaj gekolegoj,

Okaze de la 40-jara datreveno de via revuo, ni sendas al vi elkorajn salutojn kaj varman kaj sinceran gratulon de la estraro de Universala Esperanto-Asocio kaj de la oficistaro de la Centra Oficejo de UEA.

Ekde la komenco de sia aperado en Esperanto "El Popola Ĉinio" okupis tute specialan lokon en la koroj de la tutmonda esperantistaro. Pere de via revuo, multaj dekmiloj da homoj tra la tuta mondo povis akiri intiman rigardon en la kulturon, historion kaj ekonomian disvolviĝon de via granda lando. "El Popola Ĉinio" tutcerte kreis milojn da amikoj de Ĉinio en ĉiuj anguloj de la mondo.

Vi certe konscias, ke via revuo jam de multaj jaroj estas ankaŭ teknike inter la plej belaj kaj la plej prestiĝaj esperantaj revuoj, tiel ke oni ĝin kun fiero montras al la publiko en tuta centoj da landoj. Apartan gratulon pro tiu atingo.

La ŝtorma kresko de la ĉina Esperanto-movado en la lastaj jaroj aldonis plian signifon al via revuo. Ni esperas, ke tiu kresko daŭros kaj ke kun ĝi plukreskos ankaŭ via Esperanto-movado.

Ni estas malĝojaj, ke cirkonstancoj malhelpis al UEA sendi apartan reprezentanton al via jubilea festo. Memoru tamen, ke ni spirite kaj en niaj koroj estas kun vi.

Ni salutas ĉiujn kunlaborantojn de via revuo kaj ĉiujn partoprenantojn de via solenaĵo. Bonvolu akcepti niajn plej korajn bondezirojn por ankoraŭ longa vivo de "El Popola Ĉinio".

Prosperon kaj progreson. Belan kaj memorindan feston.

Amike salutas,

La estraro de Universala Esperanto-Asocio



S-ro Liu Deyou parolas en la te-kunveno.

Varma gratulo*

Hodiaŭ ni ĉiuj tre ĝojas, ke kunvenas ĉi tie ĉinaj esperantistoj kune kun samideanoj el Sovetunio, Pollando, Japanio, Francio, Belgio, Jugoslavio kaj aliaj landoj kaj regionoj por celebri la 40-jaran jubileon de “El Popola Ĉinio”.

Estas granda honoro por mi ĉeesti tiun ĉi te-kunvenon kaj veni inter la esperantistojn. Konfuceo diris: “Ni ĝojas pro amikoj venintaj de malproksime.” Lasu min, en la nomo de la kultura ministerio, varme bonvenigi la esperantisto-amikojn venintajn de malproksimaj landoj kaj la ĉinajn kamaradojn. Kaj lasu min esprimi sinceran gratulon al ĉiuj laborantoj de la redakcio de “El Popola Ĉinio” pro la 40-jara jubileo de la revuo.

La revuo atingis sume 142 landojn kaj regionojn. Transpasante la limojn de landoj, nacioj, rasoj kaj socisistemoj, ĝi ludis pozitivan rolon en la internacia kultura interŝanĝo. Kiel mi scias, la legantoj havas apartan senton al la revuo. Ili nomas ĝin “nia revuo” kaj laŭdas, ke ĝi estas enhavoriĉa kaj belaspekta, kaj ke ĝi estas “unu el la plej elstaraj kaj belaj Esperanto-revuoj”. Multaj legantoj kolektas kaj konservas la revuon, iuj eksponas ĝin, aliaj elesperantigas ĝiajn artikolojn por publikigi ilin en sialokaj nacilingvaj gazetoj aŭ ĵurnaloj. Dank’ al EPC la legantoj informigas pri la socialisma konstruado de Ĉinio kaj ĝiaj kulturo, historio, geografio, kutimoj kaj moroj kaj la vivo de ĝia popolo kaj ankaŭ pri ĝia Esperanto-movado. Tio elokvente montras, ke EPC ludas pozitivan rolon en akcelo de interkompreno kaj amikeco inter ĉiuj popoloj, en

kultura kaj scienc-teknika interŝanĝoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj en batalo por la mondpaco.

Dum la tempo de la unua printempo de la kvindekaj jaroj ĝis nun la redakcio akumulis spertojn de kvardek jaroj. Post plurfojaj reformadoj la revuo evidente plibonigis. Mi esperas, ke la redakcio daŭre konservos la proprajn trajtojn de la revuo, faros ĝin pli bona kaj pli bela kaj havos pli multe da legantoj. Mi esperas ankaŭ, ke pere de via laboro vi amikiĝos kun vasta legantaro kaj prezentos al ili la situacion post la praktikado de la politikoj de la reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio kaj ĝian brilan tradician kulturon. “El popola Ĉinio” devas havi siajn proprajn karakterojn kaj ludi sian rolon en la internacia kultura interŝanĝo por efektive fariĝi “Fenestro por koni Ĉinion”, “Ponto de amikeco” kaj “Ejo por lerni Esperanton”. Mi pensas, ke per Esperanto oni povas facile konstrui ponton inter la koroj de la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Tiu ponto estas ponto de amikeco, ponto de interkompreno kaj mi esperas, ke pli kaj pli multiĝos pasantoj sur tiu ponto. Por perfektigi la revuon, la legantoj prezentu konsilojn kaj sugestojn, kiuj, mi kredas, estas ĉiam bonvenaj.

Fine, mi refoje esprimas sinceran gratulon al la redakcio pro la 40-jara jubileo de EPC. ■

* Tio ĉi estas parolo de s-ro Liu Deyou, vicministro de la Kultura Ministerio de Ĉinio, en la te-kunveno por la 40-jara jubileo de EPC.

CHEN YUAN:

Por nova alteco en la estonteco*



S-ro Chen Yuan parolas en la te-kunveno.

Mi estas tre ĝoja partopreni la hodiaŭan jubilean te-kunvenon. Lasu min, prezidanton de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj membron de la Honora Patrona Komitato de UEA, varme gratuli la gazeton "El Popola Ĉinio", kiu celebras la 40-an datrevenon de sia fondiĝo.

"El Popola Ĉinio" trapasis 40 jarojn plenajn de maltrankvilaĵoj kaj malfacilaĵoj. Jaron post jaro la gazeto per sia reala kaj riĉa enhavo kune kun sia zamenhofa stilo, pere de Esperanto, penetrante la densan nebulon de fiaj mensogoj, ĝi sukcesis konigi la popolan Ĉinion kaj la vivon kaj idealon de la ĉina popolo al la tutmonda esperantistaro, konsekvence gajnis ilian amikecon kaj fidon, interkompreniĝon kaj kunlaboron. Jen estis la deziroj esprimitaj de la gazeto, kiam ĝi fondiĝis, kaj tio ja estas kaj estos la celo, kiun la gazeto tenos.

Okaze de la jubileo mi volas sendi miajn salutojn kaj korajn dankojn al ĉiuj, kiuj subtenis kaj helpis la gazeton enlande kaj eksterlande. Kaj mi volas kore danki ankaŭ ĉiujn, kiuj dum la pasintaj 40 jaroj laboris kaj nun laboras por la gazeto sinofere kaj senlace.

Mi esperas, ke "El Popola Ĉinio" atingos novan altecon en la estonteco kaj gajnos pli multe da amikoj kaj por si mem kaj por la popola Ĉinio.

* Tio ĉi estas parolo de s-ro Chen Yuan en la te-kunveno por la 40-jara jubileo de "El Popola Ĉinio".

Ankoraŭ longe vivu Esperanto en Ĉinio

Karaj geamikoj,

Elkorajn gratulojn mi sendas al vi okaze de via jubileo. Kvar jardekojn en la servo de la Internacia Lingvo vi montris la longan vojon, kiun vi trapasis, uzante Esperanton kaj informante pri Ĉinio.

La gazetoj, kiujn vi eldonis, la libroj, elsendoj, kiujn vi el Ĉinio per Esperanto sendis en la mondon, faris ne malmulton por kontribui al tutmondiĝo de Esperanto.

Dankon pro la fakto, ke vi ekzistas kaj ke vi laboras, inspirante per tiu laboro nin en aliaj mondopartoj.

Ankoraŭ longe vivu Esperanto en Ĉinio, je la bonfarto de ĉinoj kaj je la bona sprono por ni, en aliaj kontinentoj.

Kun sinceraj salutoj

Spomenka Štimec
estrarano pri kulturo

Je via sano!

Okaze de via bela jubileo mi tostas dankesprime
je ĉiuj, kiuj dum 40 jaroj faris ĉi tiun utilan
laboron por Ĉinio/kaj E-movado,
je ĉiuj aŭtoroj, fotistoj, korektistoj, presistoj
kaj perantoj,
je ĉiuj, kiuj pere de EPC eksciis multon pri Ĉinio!
Daŭrigu same kiel ĝis nun!
De jaro al jaro akiru pli da legantoj kaj pli da amikoj de Ĉinio!
Ek al la 100-jariĝo!

**Andrzej Pettyn, ĵurnalisto
prezidanto de Pola Esperanto-Asocio**

Salutvortoj al “El Popola Ĉinio”

Kara “El Popola Ĉinio”,

Mi ekkonis cin*, kiam ci estis nur bebo, en la lulilo, en la manoj de ciaj gegenerantoj.

Bela bebo, ja, jam ci estis kun forta staturo kaj firma karaktero. Iom simila al infano de maristo, kiu ne timas fiksrigardi la foran horizonton kaj la malproksiman estontecon.

Ci pravus kaj bravus la turmentojn, kiuj foje skuis vian vastan landon. Ŝajne ci neglektis la zorgojn de cia popolo kaj ĉiam montris al la tuta cetera mondo la serenajn vizaĝojn de junaj homoj plenviglaĵ, plentalentaj, kiuj sopiras al feliĉa estonteco, al tutmonda harmonio inter la diversaj gentoj, unuvorte: al PACO.

VI estas nun plenkreska, forta, tutbelaspekta, kun belegaj koloroj. Impona. Kun VI mi ne plu aŭdacas iĝi intima. Respekteme, kiel antaŭ bela sinjorino, antaŭ VI mi kliniĝas, “El Popola Ĉinio”.

**Ludoviko Enizan
el Francio**

* Ci estas familia pronomo uzita en Francio.

Dankon!

Okaze de la 40-jara jubileo de EPC multaj Esperantaj organizoj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj sendis al ni gratulajn leterojn, telegramojn kaj apartajn artikolojn kun amika sento. Pro tio ni kore dankas ilin ĉiujn.

Por kontentigi la legantojn ni publikigis parton de tiuj leteroj kaj artikoloj. Tamen pro la limigiteco de la paĝoj ni ne povas aperigi la ceterajn kaj petas komprenon de la sendintoj kaj legantoj.

La Red.

Esperanto, perilo de internaciaj scienc-teknikaj interŝanĝoj

LA modernaj sciencoj kaj tekniko rapide disvolviĝas en la mondo, kio faras al ni demandojn: Kiel akceli interŝanĝojn de novaj scienc-teknikaj fruktoj? Kiel rapide turni la novajn scienc-teknikajn fruktojn en produktajn fortojn? Kiel fortigi la kunlaboron en ekonomio, sciencoj, tekniko kaj media protektado? En tia situacio la granda familio de la homaro volas interkompreni kaj kunlabori por plua progreso, kaj tiu volo fortiĝas tago post tago. Do, kio estas la plej efika perilo realigi la volon? Mi opinias, ke ĝi estas Esperanto.

En la lasta tagdeko de majo mi, kiel esperantisto-raportisto de la redakcio de EPC, partoprenis en la 3-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, okazigita de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio (STEA) sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS). Mi profunde sentis, ke la konferenco en Esperanto bone enkorpigis "komprenon, kunlaboron kaj progreson", la komunan volon de la nuntempa homaro en la kontaktiĝoj.

Antaŭtagmeze de la 25-a de majo la konferenco inaŭguriĝis en la ĥoro de "La Espero". En la konferenco partoprenis pli ol 600 scienc-teknikaj laborantoj el Belgio, Ĉinio, Francio, Japanio, Jugoslavio, Pollando kaj Sovetunio. La inaŭguron ĉeestis Chu Tunnan, Chai Zemin, Yosimi Umeda, Zorka Enizan kaj aliaj famaj ĉinaj kaj eksterlandaj

E-aktivuloj, kaj ankaŭ sciencistoj de ĈAS. Yan Dongsheng, membro de la Prezidio de ĈAS kaj prezidanto de STEA sub ĈAS, prezidis la inaŭguron. Lu Jiaxi, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj honora prezidanto de STEA sub ĈAS, faris skriban paroladon. Li elmontris: "Esperanto povas esti grava perilo por akceli la internaciajn amikecon kaj kunlaborojn. Kiel simpla, facile lernebla kaj oportune uzebla universala lingvo, ĝi certe ludos gravan rolon en la interŝanĝo de sciencoj, tekniko kaj internaciaj kunlaboroj."

En la 1-a konferenco okazinta antaŭ 4 jaroj ĉinaj kaj alilandaj sciencistoj kaj teknikistoj faris proponon: fondi interna-

ciaj scienc-teknikan E-universitaton. Esperanta Instituto pri Sciencoj kaj Tekniko fondita en la 3-a konferenco estas sukcesa paŝo al fondiĝo de la E-universitato. La instituto, kune iniciatita de la Ĉina Scienc-teknika Administra Universitato kaj STEA sub ĈAS, estas novtipa eduka stablaĵo en la kombino de Esperanto kun sciencoj kaj tekniko. En la instituto la studentoj studos ne nur sciencojn kaj teknikon, sed ankaŭ Esperanton. Ili povos fari scienc-teknikan interŝanĝon en Esperanto post sia diplomitiĝo. La fondiĝo de la instituto certe profunde influos la scienc-teknikan E-movadon.

Post la inaŭguro okazis akademaj kaj fakaj kunvenoj. La konferenco ricevis ĉ. 300 disertaĵojn en Esperanto, kies nivelo estas pli

La inaŭguro de la konferenco





S-ro Chu Tunan (la dua de maldekstre en la unua vico) en la inaŭguro



Ĉinaj kaj alilandaj sciencistoj en la konferenco

alta ol tiu en la antaŭaj du konferencoj. Tio montras, ke la universala E-movado de sciencoj kaj tekniko estas vigla kaj ĝiaj atingoj pli kaj pli grandaj. En la du akademiaj kunvenoj oni voĉlegis entute 7 disertaĵojn, kiuj temas kaj pri fundamentaj sciencoj kaj pri alttekniko kaj nova scienc-tekniko, inter kiuj troviĝas ne nur teoriaj disertaĵoj, sed ankaŭ riĉaj praktikecaj fruktoj. Ekzemple, "La unua granda invento de Ĉinio — Akupunkturaj Ĝinlŭoj" de ĉina biofizikisto Zhu Zongxiang, "Tertremo kaj katastroforedukto" de ĉina geologo Ma Zongjin kaj "Polimarano — nova ekologia ŝipo" de sovetia ekologo Lev Medvedev k.a.

La ĉeestantoj de la konferenco dividiĝis en kvar fakajn grupojn, t.e. Sciencoj kaj Tekniko, Medicino kaj Ĉigong-o, Teknika Interŝanĝo kaj Komerca Kunlaboro, Lingvo kaj Edukado. En la fakaj kunvenoj ili prelegis, varme diskutadis kaj interŝanĝis informojn pri siaj fakoj.

La konferenca temo estis "Scienc-teknika Progreso kaj Internacia Ekonomia Kunlaboro". La konferenco akiris sukceson en la kombino de sciencoj, tekniko, ekonomio kaj komerco. Tio montras la rolon de Esperanto kiel internacia komunikilo en kunlaboro de internaciaj ekonomio kaj

komerco. Kun granda intereso mi partoprenis la kunvenojn pri teknika interŝanĝo kaj komerca kunlaboro. Tie la etoso estis varma. Oni aŭ senĝene parolis pri aplikado de Esperanto en la ekonomia kaj komerca kampo, aŭ konigis siajn produktaĵojn kaj teknikojn por serĉi internaciajn kunlaborantojn. Iuj atingis intencajn kunlaborajn interkonsentojn.

En la konferenco oni ne nur interŝanĝis scienc-esplorajn fruktojn, sed ankaŭ profundigis la interkompreniĝon kaj fortigis la kunlaboron. Ili laŭdis, ke la konferenco estas fruktodona. Konsiderante la ĉiam seriozan malboniĝon de la medio, en kiu la homaro vivas, ĉinaj kaj sovetiaj esperantistoj de la konferenco proponis fondi internacian mediprotektan E-Asocion por trakti universalajn problemojn pri mediprotekto kaj interŝanĝi ĉiflankajn fruktojn. La ĉinaj kaj sovetiaj esperantistoj-ekologoj okazigis specialan kunvenon.

En la konferenco oni okazigis enhavoriĉajn kulturajn aktivadojn. La ĉeestatajn eksterlandanojn tre interesis ĉinaj uŝu-o, ĉigong-o, tradicia medicino kaj sanprotektaj metodoj. Laŭ ilia propono STEA sub ĈAS nun preparas fondi la Homkorp-sciencan E-instituton.

Por honori la homojn, kiuj multe kontribuis al la disvolvigo de Esperanto kaj ĝia aplikado en la scienc-teknika kampo, la konferenco donis al 7 ĉinaj kaj alilandaj personoj la premiojn "Verda Kosmo", "Verda Paco-Amikeco" kaj "Speciala Verda Stelo" respektive.

En la 30-a de majo okazis la ferma kunveno. Sur la muroj de la kunvenejo pendis sloganoj: "Amo regu sur la tero", "La verda stelo interligas min kun vi!" kaj "Revido en Qingdao en 1992". En la fermo ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj faris paroladojn. Ili unuanime opiniis, ke la konferenco donis al ili bonan ŝancon por fari interŝanĝon pri sciencoj kaj tekniko en Esperanto. Kvankam estis multaj mankoj en la organizado, tamen ĝi estas neforgesebla. Ili esprimis, ke ili gvidos sin per la spirito de la konferenco, strebos al la aplikado de Esperanto en la scienc-teknika kampo kaj fortigos kunlaboron, por ke Esperanto havu grandan disvolviĝon kaj pli bone ludu sian rolon en la progressa afero de la homaro.

La konferenco decidis, ke la 4-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazos en la ĉina urbo Qingdao en 1992. ■

ESP-NOVAĴOJ

● En la 22-a de majo la redakcio de "El Popola Ĉinio" okazigis kunvenon por raportistoj, en kiu ĝi konigis al raportistoj de 30 ĵurnaloj, televizioj kaj radiostacioj en Pekino la revuon "El Popola Ĉinio" kaj ĝiajn statojn en la pasintaj 40 jaroj post la fondiĝo kaj la okazigotajn celebradojn. En la 24-a kaj la 25-a de majo raportistoj de la Popola Tagĵurnalo, Xinhua-novajagentejo, la Centra Popola Radiostacio, Radio Pekino, Guangming-tagĵurnalo, Ĉina Junulara Ĵurnalo, Ĉina Tagĵurnalo (China Daily) kaj aliaj 15 ĵurnaloj ĉeestis la te-kunvenon kaj la internacian vesperon por la 40-jara jubileo de EPC kaj raportis pri ili.



La inaŭguro de la televida E-kurso en Pekino

● En la 15-a de majo komenciĝis la televida Esp-kurso, kune fondita de la Centra Televizio, Qingdao-a Universitato, la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de "El Popola Ĉinio". La kurso donas 4 duonhorajn lecionojn ĉiusemajne. Pli ol 3 000 homoj anoncis sin por la kurso.

● En la 4-a de majo komenciĝis la nedeviga E-kurso en la Hefei-a Politekniko. 32 studentoj lernas en tiu kurso 4 lernohorojn semajne. La politekniko iniciatis en 1986 la nedevigan E-kurson, kaj la nuna estas la 3-a. En la politekniko fondiĝis Esperanta organizo, kiu regule okazigas Es-

perantajn aktivadojn.

● La Sichuan-a Popola Eldonejo eldonis literaturan verkon "Granda Renkontiĝo de la Homaro" kun 100 000 ideogramoj, kiu prezentas la 71-an Universalan Kongreson de Esperanto. Fu Heng kaj Xiao Huoli, aŭtoroj de la verko, priskribis laŭ siaj spertaĵoj la kortuŝajn scenojn de la kultura interŝanĝo inter la Oriento kaj la Okcidento en la granda renkontiĝo.

● La nacimalplimult-lingva fakultato de la Yunnan-a Nacimalplimulta Instituto funkciigis la nedevigan E-kurson por studentoj de la dua kaj tria klasoj de la ji-a kaj taj-a lingvoj. La kurso kun 4 lernohoroj ĉiusemajne daŭros unu jaron. Studentoj de la ji-, taj-, lisu-, kaj ĝingpo-nacioj partoprenis la lernadon.

● En 1989 la Kunming-a Eksperimenta Mezlernejo funkciigis Esperantan kurson por la unua klaso de la malsupera mezlernejo. Pli ol 470 lernejoj anoncis sin por lernado. La Kunming-a 16-a Mezlernejo elektis 50 elstarajn lernejojn el 10 grupoj de la unua klaso por fondi E-kurson. Yang Yi gvidas la Esperantajn Kursojn de la du mezlernejoj. Krome, la elementa lernejo Zhonghua de Kunming funkciigis 8 Esperantajn kursojn por la dua, tria kaj kvara klasoj ekde septembro pasintjare. Tiuj lernejoj lernas Esperanton 8 horojn ĉiusemajne.

● La Ŝtata Turisma Firmao de USSR "ORBITA" proponas altkvalite organizitajn vojaĝojn tra USSR kun ripozo en diversaj urboj kaj respublikoj, kun tre alloga programo. Ni bonvenigas proponojn de Esperanto-organizoj kaj Turismaj Firmaoj pri kolektivaj vojaĝoj /prefere reciprokaj sendevizaj interŝanĝoj/ kaj akceptos turistojn individue. Adreso: Esperanto-"ORBITA", ab. ja. 73, VOLĴSKIJ-30, Volgogradskaja obl., USSR-404130.

● Dum la tagoj 19.02.-16.03.1990 /escepte de sabatoj kaj dimanĉoj, kiam loka poŝ-

tofiĉejo ne funkcias/ uzas loka poŝto en urbo Stražnice, distr. Hodonin, Ĉeĥoslovakio, porokazan Esperantan afrankmaŝinstampilon por propagandi Esperanton kaj la Movadon. Temas pri la unua Esperanta afrankmaŝinstampilo uzata je teritorio de Ĉeĥoslovakio dum nia historio.



Esperanta afrankmaŝinstampo

● La Itala Radio (RADIO ROMARAI) elsendas en Esperanto ĉiun sabaton, je horo 20:00 laŭ grenviĉa tempo (GMT), kio egallas al horo 21:00 laŭ mez-eŭropa tempo (kaj al 22:00, en Italio kaj en multaj eŭropaj landoj, dum la periodo de somera horo).

La elsendoj okazas laŭ jenaj frekvencoj/ondlongoj:

kHz	11800	9710	7275
metroj	25,42	30,90	41,24

Al raportoj pri aŭskulto oni respondas per konfirmo-kartoj (QSL) en Esperanto. Estas je dispono senpaga, ilustrita programkajero, tamen ne en Esperanto, sed en la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj itala. Petante programon, oni bonvolu diri, en kiu el la diritaj lingvoj oni deziras ĝin. Adreso: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320. Centro Corr., I-00100 Roma RM, Italio.

● Rok-Gazet', la unua eldonaĵo de EUROKKA aperis tute en Esperanto antaŭ nelonge. Eldoniĝis ankaŭ Esperanto-Rok-disketo, tiel ke kreiĝis la Esperanto-Eldonejo "Vinilkosmo". Tiuj Esperantaĵoj estas mendeblaj ĉe EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio, F-31450 Donnevile, Tel. 61.81.95.65, Francio.

“Urbo” en montaro

Teksto kaj fotoj de ZU HUI kaj WEI LIAO

NI malkaŝe diras, ke “Kemifibra Urbo” ne estas urbo, kvankam ĝi havas 5 300 oficistojn kaj laboristojn kaj kovras areon de pli ol 1.7 milionoj da kvadrataj metroj, kvankam ĝi importis teknikon avangardan en la 80-aj jaroj kaj produktas ĉefajn serio-produktaĵojn vinilono kaj dilon, ĉiu kun jara produktokvanto de pli ol 10 000 tunoj.

Ĝi, granda moderna kombinato nomata Fujian-a Kemifibra Fabriko, devis lokiĝi en montregiono en centra Fujian-

provinco abunda je kalkoŝtono. Ĝi distancas de la plej proksima gubernia urbeto Yong’an je 7 km.

Pro la seka vivo en la montaro, pro la nesolvo de la eduka problemo de infanoj kaj pro la malfacileco akiri pli da fakaj scioj ĉ. 300 teknikistoj forlasis la fabrikon por labori en urboj.

Tamen tio okazis en la komenco de la 80-aj jaroj.

Neniu scias, kiam la oficistoj kaj laboristoj fiere eknomis sian fabrikon “Kemifibra

Urbo”; neniu scias, kiam la “Kemifibra Urbo” ekhavis infanĝardenon, element- kaj mezlernejojn, teknikan lernejon, kulturalan centron, junularan domon, bibliotekon, televidan stacion, filmoteatron, hospitalon, parkon, piedpilkon, ludkampon, atletikejon, naĝbasenon, iluminatan pilkludejon..., kiuj videblas en la urboj. Krome, ĝi havas naturan guston, kiun ne havas la ur-

boj. En serenaj festotagoj ĝe junuloj de la fabriko, tiuj kaj aliaj familioj venas al montpiedo ĉe rivereto proksime al la fabriko, ekbruligas kampfajron, ludas gitaron, gaje kantas kaj babilas.

La fabriko ofte organizas diversajn amuzajn kaj sportajn aktivadojn. Krom konkurso de ŝnur-tirado en la Novjara Tago, vizito de parko en la Printempa Festo, monstro de lanternoj en la Lanterna Festo kaj vetkurado ĉirkaŭ la fabriko en la 4-a de majo, la fabriko ofte okazigas ankaŭ amikecan balon, konkursojn de piedpilko, briĝo k.a.

Estas menciinda la laborista sportkunveno okazigata de la fabriko en ĉiu 4-a jaro. La 2-a Laborista Sportkunveno de la fabriko okazinta pasintjare daŭris 6 monatojn, dum ĉi oni faris konkursojn de korbopilko, flugpilko, piedpilko, tablotenis, ŝakludo, briĝo, naĝo, kurierkolomboj, pafado kaj atletiko, je 790 matĉoj. 3 340 homoj, t.e. 65% de la oficistoj kaj laboristoj, partoprenis la sportkunvenon, pli ol 8 000 homoj. La oficistoj kaj laboristoj de la fabriko ŝerce nomas la sportkunvenon “malgrandaj olimpikoj”.

Kiel por la olimpika celo “grave estas partopreni” la koncerna gvidanto de la fabriko penas partoprenigi ĉiujn en amuzaj kaj sportaj aktivadoj, kun la intenco altigi la kvaliton de la oficistoj kaj laboristoj kaj

Konkurso de longdistanca kuro okazigita de la fabriko






Amatoro de arboradika skulptado por miniatura envaza pejzaĝo



Piedpilka ludo

Draka danco en sportkunveno de la fabriko



la koheremon de la entrepreno. Kiel diris Tang Jinhai, prezidanto de la laborista sindikato de la fabriko, ĉiuj oficistoj kaj laboristoj trovu sian lokon post la 8-hora laboro kaj havu bonan medion por laboro kaj vivo.

Chen Guoquan, iama laboristo de la provinca ĉefurbo Fuzhou, diris al ni, ke antaŭe li volis reveni al Fuzhou, sed nun, post kelktaga restado en tiu urbo, li jam sentis la vivon seka. "En la fabriko mi estas gaja," li diris. "Tie estas okupo, kiun mi ŝatas." Li estas membro de la konsilantaro de Uŝu-asocio de la fabriko kaj gvidas korpobeligan kurson kun 15 personoj. Ĉiuvespere li trejnas la kursanojn unu kaj duonan horojn kaj ĉiu konsumas forton egalan al transporto de 1-2 tunoj da objekto. Li kaj liaj kamaradoj montras sin senlacaj tiuflanke. "Bona ludo post laboro, vigeleco en laboro," diris Chen Guoquan kun ridado.

Krom Uŝu-asocio de Chen Guoquan, fondiĝis en la fabriko ankaŭ 15 asocioj kaj amato-



Ekskurso

raj grupoj, kiel tiuj de kurierkolomboj, briĝo, ĉigong-o, arboradikoskulptado kaj envaza miniatura pejzaĝo. En kunlaboro kun la laborista sindikato de la fabriko tiuj asocioj kaj grupoj aktive organizas diversajn aktivadojn.

La enhavoriĉaj kulturaj aktivadoj ne nur iom post iom ŝanĝis la opinion de laboristoj pri la vivo en la montregiono kaj


ŝanĝis ilian ideon forlasi la fabrikon, sed ankaŭ altiris alilokajn knabinojn. Iu knabino veninta el Harbin diris al ni, ke ŝi trovis tie amaton. La knabino nomiĝas Feng Lijun. Leginte anoncon pri edziĝopeto publikigitan de la laborista sindikato de la fabriko en 1985, ŝi senhezite forlasis la grandan nordan urbon Harbin por fiksloĝi tie.

"De la infaneco mi sopiras sudan Ĉinion kun ruĝaj floroj kaj verdaj herboj apud monto kaj ĉe rivero," ŝi diris emocie en 800-gradaj miopaj okulvitroj. "Nun mi fine loĝas tie."

Feng Lijun laboras en lernejo funkciigata de la fabriko. Ŝi ŝatas danci post laboro. La fabriko okazigas senpagan balon 3-4 fojojn ĉiusemajne. En alia tempo ŝi legas librojn, ĝuas muzikon kaj rigardas televidajn programerojn.

Feng Lijun ne bedaŭris sian elekton. "Mi ŝatas vivi tie," ŝi senkaŝe diris. "Kvankam tie estas montaro, tamen ĝi havas multon, kiu mankas en grandaj urboj." ■

Snurtira konkurso de laboristinoj




La Rikolta Festo de Barbadoso

Fotoj de DING BAOZHONG

Barbadoso oriente de la Kariba Maro abundas je sukerkano. En julio kaj aŭgusto, post falĉado de sukerkano, oni solenas la Rikoltan Feston. Dum la festo, la viroj kaj virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, kantas, dancas aŭ paradas alivestite.

Antaŭ tre longe, kun la disvolviĝo de sukera produktado, sennombraj afrikanoj estis transportitaj kiel sklavoj al Ameriko kaj tie estis multe turmentitaj. Nur post rikolto de sukerkano ili povis ripozi mallonge. En la tempo la sklavoj en Barbadoso kantis kaj dancis por sin amuzi, kio fariĝis poste la Rikolta Festo.

En 1966 Barbadoso finis la koloniisman regadon far Britio kaj deklaris sian sendependecon. Kaj la Rikolta Festo estis difinita kiel la plej solena festo de la lando.



Aktoj en parado

Al parado






Geknaboj paradas kun fiŝmodelo sur la kapo.

Paradanto kun masko de papilio

Grimpado



Ĉina ĉigong-o

de XU SHITIAN

III. MALSTREĈA ĈIGONG-O

Malstreĉa ĉigong-o, speco de kvieta ĉigong-o, estis kreita de ŝanhajaj ĉigong-istoj surbaze de klinika praktiko en 1957. Per ĝi sin ekzercante, oni povas liberigi sin el cerba kaj korpa laco kaj teni sin en bona humoro kaj sanstato. Krome, ĝi estas utila ankaŭ al kuraco de neŭrastenio, hipertensio, kronika bronkito, glaŭkomo, gastroenterito kaj aliaj kronikaj malsanoj.

Sin ekzercante per malstreĉa ĉigong-o, oni ritme kaj laŭpaŝe turnas sian atenton al malstreĉo de la muskoloj kaj ostoj de diversaj korpopartoj por fari la korpon malstreĉa kaj liberigi sin de mensa kaj organisma streĉiteco. Dum ekzercado oni devas parkere legi la vorton "malstreĉo" foje refoje.


La fundamenta metodo de malstreĉa ĉigong-o estas malstreĉi sin laŭ 3 linioj, t.e., malstreĉi la korpon de supre malsupren kaj laŭvice: laŭ antaŭa, posta kaj flankaj partoj.

Laŭ la unua linio: Malstreĉi laŭvice la flankojn de la kapo kaj kolo, ŝultrojn, brakojn, kubutojn, antaŭbrakojn, pojnajn, manojn kaj fingrojn.

Laŭ la dua linio: Malstreĉi laŭvice la vizaĝon, kolon, bruston, abdomenon, antaŭajn partojn de la femuroj, genuojn, antaŭajn partojn de la kruroj, piedojn kaj piedfingrojn.

Laŭ la tria linio: Malstreĉi laŭvice la metencefalon, nukon, dorson, lumbon, koksojn, malantaŭajn partojn de la femuroj, poplitajn kavojn, surojn, kalkanojn kaj plandojn.

Oni devas ekzerci sin laŭ jena maniero: Komence de la unua linio fiksi la atenton sur la flankoj de la kapo kaj kolo, parkere legi la vorton "malstreĉo" foje refoje kaj poste laŭvice fari tion al la fingroj. Fiksi la atenton sur la mezaj fingroj por 2 minutoj. Malstreĉi sin laŭ la dua linio. Farinte la mal-



streĉon laŭvice, fiksi la atenton sur la piedaj dikfingroj por 2 minutoj. Post tio malstreĉi sin laŭ la tria linio. Farinte la malstreĉon laŭvice, fiksi la atenton sur la piedarkoj por 2 minutoj kaj fine fiksi la atenton sur la umbiliko aŭ sur la fokuso de la infekto por 4 minutoj. Jen unu cirkulo.

Ĉiufoje oni devas fari 2 aŭ 3 cirkulojn, kvietiĝi por kelka momento kaj fini la ekzercadon.

Dum ekzercado, se oni sentas, ke iu korp parto estas tute ne aŭ ne sufiĉe malstreĉita, oni ne devas malpacienciĝi, sed laŭvice malstreĉi plue la korp partojn unu post alia. Ke oni faras la malstreĉon rapide aŭ malrapide, tio dependas de la sento de la ekzercanto. La tro rapida aŭ tro forta malstreĉado kaŭzas kap-streĉiĝon, dum tro malforta aŭ tro malrapida

malstreĉado kaŭzas dormemon.

Surbaze de la malstreĉo laŭ la 3 linioj, oni povas ekzerci sin per malstreĉo de parta aŭ tuta korpo.

Malstreĉo de parta korpo. Kiu kapablas lerte ekzerci sin per la tri-linia malstreĉo, tiu povas fari specialan ekzercadon de korp parto, al kiu okazas patologia ŝanĝiĝo. Ekz., la suferantoj de ŝultra peri-artrito povas malstreĉi la ŝultrojn, dum la astmuloj povas malstreĉi la trakeon.

Malstreĉo de la tuta korpo. Malstreĉi la tutan korpon de la kapo ĝis la piedoj, t.e. turni la atenton pri malstreĉo de supre malsupren kvazaŭ fluanta akvo, parkere legante la vorton "malstreĉo" foje refoje. Tiu metodo estas utila por kuraci hipertensio kaj kaptur-niĝon. Ĝi utilas ankaŭ al la komen-cantoj de ĉigong-ekzercoj, kiuj havas malfacilon en la tri-linia malstreĉo.

Por sin ekzerci per malstreĉa ĉigong-o oni devas sidi sur benko, apogi sin sur sofo aŭ seĝo aŭ kuŝi en lito surdorse. La febluloj aŭ suferantoj de visceroptozo devas sin ekzerci kuŝante surdorse. La homoj kompare sanaj aŭ suferantoj de hipertensio aŭ kap-kaj dent-doloroj devas sin ekzerci sidante.

Generale dirite, ekzercante sin per tiu ĉi ĉigong-o, oni povas nature spiri, kaj ankaŭ povas turni la atenton sur koncernan korp parton dum enspiro kaj parkere legi la vorton "malstreĉo" dum elspiro. Tamen estas bone, se oni malŝveligas la ventron dum elspiro kaj malstreĉas ĝin dum enspiro.

Estas bone, se oni turnas la atenton sur pli grandan korp parton dum ekzercado, kaj plie, la atento devas esti delikata kaj ne tro forta. Sin ekzercante kuŝe per ĉigong-o, oni povas endormiĝi, se atakas dormemo, tamen se oni dormemas ofte tage, oni do devas sin ekzerci sidante.

Per malstreĉa ĉigong-o oni devas sin ekzerci 1-2 fojojn ĉiutage po 30-60 minutojn en difinita tempo. La metodo fini la ekzercadon estas sama kiel tiu de nejjangong-o, kiun mi prezentis en la 7-a numero de la revuo. ■

Pri “Krizantemo”

de DI ZI

*Ĝi floras nemiksiĝe kun la flora sortimento,
aparte ĝi ĉe la barilo staras en kontento;
preferas morti ĝi aroma sur la propra branĉo
ol flirti lau/e en blovado de la norda vento.*


Jen poemo verkita de Zheng Sixiao (1241-1318 p.K.), fama poeto kaj pentristo de la Suda Song-dinastio (1127-1279). Post pereado de la dinastio li vivis ermite en Suzhou. Li ĉiam rigardis al sudo, kiam li sidis aŭ kuŝis. Li donis al si kromnomon “Suonan” kiu signifas, ke li neniam forgesos Song-dinastion. Li ŝatis pentri arkideon kun folioj kaj floroj maldensaj kaj radikoj elterigitaj, per kiuj li aludis la pereon de Song-dinastio. Li ŝatis pentri ankaŭ bambuon kaj krizantemon, per kiuj li montris sian narcisismon.

“Krizantemo” estas poemo surpentraĵa. La krizantemo sub lia plumo estas alegorio de lojaleco de la aŭtoro. La krizantemo preferas velki sur la propra branĉo ol fali en blovado de la norda vento. Ĉi tie la poeto metafore montris sian senfinan lojalecon al Song-dinastio.

S-ro Li Kuizheng estas fama pentristo de floro-birdaj pentraĵoj. Li estas tre lerta en pentrado de delikatliniaj kaj liberstilaj pentraĵoj. En la lastaj jaroj li asimilis la eminentajn trajtojn de aliaj skoloj kaj kreis tute freŝstilajn verkojn. En tiu ĉi pentraĵo li pentris la florojn per densa farbado kaj tuĉkonturado, sed la tigojn kaj foliojn per tuĉado (tradicia pentrarto por pentri florojn kaj birdojn sen konturado). Precipe, la floroj bravaj en la frosta ventado donas apartan guston.

Ankaŭ s-ro Li Han estas pentristo de floro-birdaj pentraĵoj. Li lertas en kaligrafio. Ĉi tiu kaligrafia verko donas impreson de glateco, libereco kaj belaspekto. ■

Kaligrafajo de Li Han





Pentrajo farita de Li Kuizheng por la poemo



“Eminentaj Popolaj Servantoj”

S-INO Dong Chunfu estis multfoje premiita, tamen ŝi plej ŝatas la honoran titolon “Eminenta Popola Servanto”, kiun ŝi ricevis en iu amasa kunveno antaŭ nelonge. Ŝi, estrino de la Xinxing-kvartala oficejo de Heping-distrikto de Tianjin, diris, ke ŝi estas fiera kaj kontenta pro laŭdo de la loĝantoj.

S-ino Dong organizis la Volontulan Asocion de Socia Servo en sia kvartalo, por iniciati reciprokan helpon inter loĝantoj. Dank’ al tio, pluraj familioj,

kiuj ne sukcesis dungi profesiajn familiajn servistojn, estis senpage prizorgataj. Ankaŭ tiuj familianoj favorataj de la asocio faras sian eblon por helpi aliajn. Pro tio multaj malfaciloj de la loĝantoj en la ĉiutaga vivo solvigis kaj iliaj rilatoj pliboniĝis tagon post tago.

Heping-distrikto en 1989 kaj 1990 organizis amasan juĝadon de la kadroj kaj premiadon de la elstaraj. En tiu aktivado 15000 laborantoj el diversaj branĉoj de la socia servo sub la Heping-distrikta Registaro, inkl. 5 ŝta-

tajn funkciulojn kaj 10 bazajn kadrojn, estis honoritaj per “Eminenta Popola Servanto”, 5 el ili dufoje ricevis tiun gloron.

Tiun aktivadon iniciatis membroj de la tiea Popola Kongreso (PK) kaj Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (PPIK). S-ro Xing Yinming, membro de PK de la distrikto, diris, ke la aktivado estas utila por la voĉdonintoj en ilia kontrolo de la kadroj. S-ro Xing estas unu el la respondeculoj de la grupo por kontroli la registrajn aferojn de la distrikto kon-

Zhou Xueqian en drenado



Dong Chunfu prizorgas senhelpan maljunulinon.



sistanta el membroj de PK kaj PPIK. En 1988, antaŭ vintro, la grupo postulis, ke la distrikta registaro bone aranĝu la vintran vivon de la loĝantoj, kaj instigis la Karbo-kompanion, Komerccan Buroon, Grenan Stacion, Urbo-konstruan Oficejon, Domo-administrejon kaj Akvoprovizan Kompanion de Heping-distrikto garantii pri bona servo. Dank' al tio, la servaj institucioj sub tiuj departementoj multe plibonigis sian laboron, kiel eble plej multe nuligis la burokrat-komercistan laborstilon, farante zorgeman servon al la loĝantoj. Antaŭe oni devis longe vicitendi por aĉeti karbon kaj legomojn bezonatajn en vintro, sed vintre de 1988, oni povis havigi al si karbon, tuj post sia telefonado al la karbovendejo. Tiam multaj legomovendistoj portis legomojn al la loĝantoj. Printempe de 1989, oni proponis premii la elstarajn kadrojn en la socia servado, ankaŭ membroj de PK kaj PPIK opiniis, ke tio povos plifortigi la mastran konscion de la amasoj kaj popola-servistan konscion de la kadroj. Tial, la akti-

vado pri elekto de eminentaj popolaj servantoj iris en du sinsekvaj jaroj en la distrikto.

En la distrikto funkcias 261 loĝantaraj komitatoj (aŭtonoma organizo de la urbanoj). Ili estis taskitaj pri kolekto de opinioj de la loĝantoj pri la kadroj kaj pri elekto de la eminentaj popolaj servantoj en la nomo de la loĝantoj. Tian Yulan, maljuna estrino de la Huazhong-strata Loĝantara Komitato, diris, ke tio estas ŝatata de la loĝantoj, kiuj vigle montras siajn opiniojn pri la laboro de la ŝtatoficistoj. Kvankam oni ne bone konas la oficistojn, tamen scias kiel ili servas en la loĝloko. Iu maljunulino laŭdis Zhao Xueqian, kiu dufoje estis honorita per "Eminentaj Popolaj Servantoj", dirante: "Mi deziras, ke pli da oficistoj fariĝu bonaj servantoj kiel Zhao."

Zhao Xueqian estas estro de la Administrejo de Drensisistemo sub la Heping-a Urbo-konstrua Oficejo. Antaŭe, en la distrikto malpura akvo ofte superfluis pro eluziĝo kaj mallarĝo de tieaj subteraj dreniloj.

Tiam kvankam oni faris multajn proponojn, la problemoj tamen restis nesolvitaj. Fariĝinte estro de la Administrejo, Zhao ŝanĝis la antaŭan labormanieron kaj faras periodan glatigon de la tuboj. Sen ŝtata investo, li organizis la socian servadon, kolektis pli ol 200 000 juanojn kaj anstataŭigis la eluzitajn drenilojn per la novaj. Nun, en tiu ĉi distrikto ne plu superfluas la malpura akvo. Zhao proponis al siaj kolegoj, ke ili petu la amasojn kontroli ilian laboron kaj estu komplezaj al loĝantoj. Post plenumo de sia tasko liaj kolegoj petis de la loĝantoj taksadon. En 1989, la Administrejo pli-ol-900-foje senpage glatigis la drenilojn en la hejmo de la loĝantoj. Ĉiumonate Zhao vizitas la loĝantojn por informiĝi pri iliaj rimarkigoj kaj proponoj kun la celo plibonigi sian laboron.

Zhao estas modelo de "Eminentaj Popolaj Servantoj" en la solvado de realaj problemoj de la amasoj. S-ro Zhang Hao-sheng, estro de Heping-distrikto, diris, ke la publika taksado pri kadroj estas tre utila al formiĝo de la laborstilo solvi la malfacilojn por la loĝantoj. ■

POR KOMENCANTOJ

Sorto

ŜI edziniĝis jam tri fojojn, sed ĉiuj tiuj edzoj mortis malpli ol unu jaron post la geedziĝo. La unua edzo mortis pro trafika akcidento, kaj la aliaj du forpasis pro malsano.

Kiam ŝi edziniĝis la kvaran fojon, ŝi jam aĝis 31 jarojn. Ŝia nova edzo estis bela junulo. Oni

diris, ke ili hazarde konatiĝis en trajno.

La geedziĝan ceremonion ĉeestis malmultaj homoj. Kelkaj scivolemaj maljunulinoj iris al la novedzo dum ŝia foresto kaj multe demandis lin.

Iu el ili demandis la novedzon tenante lian manon:

"Kiel vi opinias pri ŝi?"

"Ŝi estas bona."

"Ĉu vi ne sentas skrupulojn?"

"Kial?"

"Ĉu vi ne aŭdis, ke ŝi edziniĝis antaŭe jam tri fojojn?"

"Tion mi ne zorgas."

"En malpli ol unu jaro..." la maljunulino murmuris al si, frotante la manojn. "En malpli

ol unu jaro..."

Pasis du jaroj, kaj la geedzoj multe atentataj naskis filineton.

Estis printempa vespero. La familio promenis sur strato. Ilin haltigis maljunulino de arbas-tono.

"Kia ĉarma infano!" la maljunulino karesis la kapon de la infano per ostecamao.

"Mi konas vin," la patrino de la infano diris al ŝi ĉe la oreo.

"Jes, jes," la patrino de la maljunulino glitis sur la patrinon de la infano. Ŝi malrapide starigis tri fingrojn similajn al velkintaj brunoj kaj diris: "Mi havis la saman travivaĵon kiel vi en mia junaĝo, sed mi ne trovis la kvaran..." ■







Yang Guanghua en pentrado

Yang Guanghua kaj liaj pentraĵoj


Pentristo Yang Guanghua naskiĝis en Zhongxian-gubernio, Sichuan, ĉe pitoreska bordo de Yangzi-rivero. Nun li okupiĝas pri farado de ĉinstilaj pentraĵoj kaj instruado de ilia arto en la Centra Nacimal-plimulta Instituto en Pekino. Surbaze de tuĉoverso, tradicia ĉina tuĉopentrado, li provas novan pentradon: apartigi plumon kaj tuĉon por plene reliefigi la rolon de tuĉo en prezentado de la temo. Unue li verŝas tuĉon kaj poste, trempinte la plumon en akvo, pentras sur la verŝita tuĉo, tiel ke aperas neklaraj blankaj strioj sur la bildo. Tiuj strioj kaj la verŝita tuĉo pli-malpli sentigas poeziecon. Liaj verkoj distingiĝas per originala strukturo, delikata tuĉado kaj riĉa imago.

Posti neĝado







Xishuangbanna en nokto



Fruktoj maturaj





Lasera kuracado

● Kun la disvolviĝo de lasera tekniko, Ĉinio multe progresis en esplorado kaj klinika aplikado de lasera medicino. Nun, diversaj porkuracaj laseroj estas uzataj en ĉiuj urboj, grandaj kaj malgrandaj, de Ĉinio. Pli ol 130 malsanoj estas kuracataj per lasero.

● Ĉi-somere estis akirita riĉa rikolto de semoj de kolzo, unu el la ĉefaj oleodonaj plantoj de Ĉinio, je 900 000 tunoj pli multe ol en 1989, kun produktokvanto je 15% pli granda ol tiu en la jaro.

● Ankoraŭ restas malfortaj la materia kaj teknika bazoj de la ĉina agrikultura produktado, la pokapaj produktokvantoj de la ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj plejparte estas malpli altaj ol tiuj en la mondo. Nun ĉ. 40 milionoj da homoj de Ĉinio ne havas sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj.

● Sichuan-provinco en sudokcidenta Ĉinio jam fariĝis provinco kun plej granda longo de ŝoseoj kaj plej multaj pontoj en Ĉinio. Laŭ statistiko, en la provinco iras ŝoseoj kun totala longo de 196 600 km kaj kuŝas 15 200 pontoj, kies totala longo estas 446 800 metroj.

● La statistiko farita de la Ministerio de Publika Sano de Ĉinio montras, ke nun la nombro de kuracistoj kaj flegistinoj en Ĉinio jam atingis 829 mil, 28-oble pli multe ol tiu en septembro 1949.

● Ekde 1979, en kiu Ĉinio ekpraktikis la politikon de reformo kaj pordmalfermo, la procentaĵo

de solinfanoj kreskas jaron post jaro. Tiu de solinfanoj sub aĝo de 14 jaroj estas 1.7%, kaj tiu de solinfanoj sub aĝo de 1 jaro estas 52%. En la fino de 1989 la ĉinaj infanoj konsistigis 27.7% de la totala loĝantaro. La infanoj kreskas pli bone ol tiuj en

aliaj disvolviĝantaj landoj.

● En la lastaj jaroj Ĉinio atingis internacie avangardan nivelon en la esploro pri tajdo kaj ŝtormotajdo. Ĝi starigis 280 tajdo-mezurajn staciojn laŭ marbordoj kaj sur insuloj, ke ĝi fariĝis unu el la landoj, kiuj havas la plej densajn retojn de mezurado de maro en la mondo. Ĝi multfoje publikigis anoncojn pri fortaj ŝtormotajdoj, kaj dank' al tio multe malgrandiĝis perdo.

● La kosmetika lakto "Miqi", produktita de la Pekina Yamei-a Fabriko de Ĉiutagaj Kemiaĵoj, kiu akiris oran medalon en la 38-a Brusela Eŭreka Foiro de Mondaj Inventoj, estis sankciita lastatempe de la Usona Manĝaĵa kaj Medikamenta Administrejo, internacie aŭtoritata organo de kontrolo. Ĝi, registrite en Usono, fariĝis la unua ĉina kosmetikaĵo, kiu povas pogrande eksportiĝi al Usono. Tio markas, ke la ĉina kosmetikaĵo nun enviciĝis inter la mondaj altklasaj kosmetikaĵoj.

● La 1 168-metra pasagera kablovojo en Emei-monto de Sichuan-provinco, kun plej alta altitudo, plej longa spano kaj plej kruta deklivo, estis lanĉita antaŭ ne-

longe.

La kablovojo ne nur faciligas al turistoj vojaĝon, sed ankaŭ liveras al ili ŝancon ĝui la ĉarman Emeimonton en telfero.


● La Pekina Tongren-a Okulbanko fondiĝis en Pekino junio de la kuranta jaro. Ĝi prenis sur sin la ĉefan taskon kolekti, konservi kaj esplori korneojn por pli multe sukcesigi korneo-transplantadon. Statistiko diras, ke en Ĉinio pli ol 10 milionoj da homoj suferas de malforta vidkapablo. 2 milionoj kripliĝis de kornea malsano, plejparto de ili estas junuloj kaj infanoj.

● Antaŭe oni opiniis, ke la Granda Muro komenciĝas oriente de Shanhaiguan-pasejo, nordorienta Hebei-provinco. Kaj nun arkeologoj ne nur trovis grandan nombron da brikoj, tegoloj kaj ŝtonpecoj de Ming-dinastio (1368-1644) por konstrui la Grandan Muron, sed ankaŭ malkovris ruinojn de teramasoj por la muro, en Dandong, Liaoning-provinco. Fakuloj opinias, ke la Granda Muro komenciĝas, por diri ĝuste, oriente de Hushankou proksime de Dandong.

● 20 membroj de la Paca Montgrimpa Trupo de Ĉomolangma el Ĉinio, Sovetunio kaj Usono, en kvar grupetoj, ekde la 7-a de majo ĉi-jare, sukcesis surgrimpigi ĝin en 4 sinsekvaj tagoj.

● Por plue disvolvi la duflankan varŝanĝan negocon, Ĉinio kaj

Membroj de la montgrimpa trupo hisas la naciajn flagojn de la tri landoj sur Qomolangma.



Sovetunio decidis malfermi po 5 havenojn kaj 1 fervojan stacion unu al la alia. La ĉinaj 5 havenoj estas Tongjiang, Heihe, Harbin, Jiamusi kaj Fujin kaj la fervoja stacio Suifenhe. La sovetuniaj estas Kalininskoje, Blagoveŝĉensko, Habarovsko, Komsomolsko kaj Pojarkovo kaj la fervoja stacio Gruĉsej.

● Depost 1979, en kiu la Ĉina Popola Banko prove emisiis oran moneron memore al la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la eksporta negoca valoro de ĉinaj oraj moneroj atingis 200 milionojn da usonaj

dolaroj kaj per tio okupas la trian lokon en la internacia ormonera merkato.

● La unua granda vaks-homfigura ekspozicio de Ĉinio, kiu prezentas diversperiodajn historiajn personulojn de la lando, estis malfermita antaŭ nelonge al en- kaj eksterlandaj turistoj en Pekino. Ĝi kun areo de 4 600 kvadrataj metroj eksponas pli ol 50 vaks-homfigurojn en tri haloj.

● En la daŭro de 55 tagoj ĉina kaligrafo Zhao Zhizhong kopiis Vajra-Prajnaparamitan Sutron el 5 390 ideogramoj per 24 g. da ora



La vaks-figuro de d-ro Sun Jatsen en la ekspozicio pulvoro.

Koncernaj fakuloj kaj religianoj opinias, ke ĝi estas tre rara trezoro post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respond-kuponoj por kvin vortoj aŭ mal-longigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

● Dez. kor. Jurij Marĉenko, Mira, 3-78, Curupinsk, USSR - 326520.

● 40-j. biologo dez. kor. kun esp-istinoj pri literaturo, fotografio, medio, edukado Esperante, angle, germane. Adr.: Petro Munibi, P.O. Box 742, Woden Act 2606, Aŭstralio

● S-ro He Jin, 27-j., dez. kor. tm. kaj interŝ. pm. bk. Adr.: C/O Gong Xuelin, Nanzhang Jiaoyanshi, 441500 Nanzhang, Hubei, Ĉinio

● 37-j. verkisto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Gong Xuesheng, Nanzhang Baoshe, Hubei, 441500, Ĉinio.

● Zhou Yuanlan, 31-j. instruistino, dez. kor. tm. Esperante, angle pri ĉiuj temoj. Adr.: Jingwei Xuexiao, Nanzhang, Hubei 441500, Ĉinio.

● 36-j. oficisto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kaj interŝ. pm. kaj

bk. Adr.: Li Like, Mao Tai Lu 200-1-106, Shanghai, 200051, Ĉinio.

● 21-j. oficistino dez. kor. tm. pri Esperantaĵo, pm., pk. kaj insigno. Skribu al: Wang Jiang, P.O. Box 741, Ruijin, 342509 Jiangxi, Ĉinio.

● Jaŭ Fangmin, 33-j., volas korespondi pri preso, vojaĝo, entrepreno kaj aliaj. Adr.: Lü Xing Yin Shua Chang, 14 Nei Huan Lu, Nanning, Guangxi, Ĉinio 530022.

● La membroj de Jiangmen-a Esperanto-Ligo dez. kor. kun esperantistoj de la tuta mondo. Adr.: 502/17, Nonglin Xincun, Jiangmen, Guangdong, 529000, Ĉinio.

● Ni volas eldoni Esperantan ŝerc-libron. Bonvole sendu ŝercojn. La Esperanto Klubo de York, C/O Guppys enterprise club, 17 nunnery lane, York, Britio.

● La verda flago estas nova klubo en Zairio kaj dez. kor. kolektive aŭ individue kun iuj ajn samideanoj aŭ kluboj tra la mondo kaj petas subtenon de la asocioj aŭ kluboj por la ricevo de instrumaterialoj, etikedoj, flagoj, E-insignoj kaj tiel plu. Por ĉiuj informoj bonvolu kontakti kun prezidanto s-ro Makubukva Ndonzoao, B.P 275 Mbanza Ngungu, BAS-Zaire,

Zairio.

● Esperanto Klubo de urbo Elec dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj. SU-399740 Lipeckaja obl., u. Elec, str. Koroljova, d. 7, kv. 71, Klubo "Esperanto".

● Pentti Tormala, laboras en Naturhistoria Muzeo, volas fondi por la loka kaj internacia agado la internacian grupon. Adr.: Tuomarinkartano, SF-06100 Porvoo, Finnlando.

● Laŭra Krafft, 23-j., dez. kor. kun gesamideanoj, kiuj interesiĝas pri literaturo, arto, muziko, teatro kaj turismo. Adr.: Str.: Victoriei 46/5, 4150 - Odorheiu-Secuiesc, Jud. Harghita, Rumanio.




Laŭra Krafft

● 23-j. komencanto, studento-inĝeniero, dez. amikiĝi kun ĉinaj geesperantistoj kaj kor. pri diversaj temoj: kulturaj objektoj, vojaĝoj, tradicioj de aliaj landoj, ekonomio, lingvoj. Philippe Huysveld, Reeboklaan 26, 1980 Tervuren, Belgio.

ĈINAJ POŝTMARKOJ

Poŝtmarka bloko por la Poŝtmarka Ekspozicio de la Azia Sportkunveno

La 21-an de septembro ĉi-jare, antaŭvespere de la inaŭguro de la 11-a Azia Sportkunveno, okazos en Pekino la Poŝtmarka Ekspozicio de la Azia Sportkunveno. Okaze de tio la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisios la poŝtmarkan blokon.



Memorigaj poŝtmarkoj kaj poŝtmarka bloko por la azia sportkunveno

La 22-an de septembro ĉi-jare okazos en Pekino la 11-a Azia Sportkunveno. Okaze de tio la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisios la trian kompletan da memorigaj poŝtmarkoj. La poŝtmarka bloko ampleksas tri kompletojn da memorigaj poŝtmarkoj por la azia sportkunveno. La unua kompleto estis emisiita la 20-an de julio 1988 (du pecoj meze de la dua vico); la dua estis emisiita la 15-an de decembro 1989 (kvar pecoj malsupre); kaj la tria el ses pecoj estos emisiita la 22-an de septembro 1990.



“Hejmo” de aziaj sportistoj

— Vizito en la Vilaĝo de la Azia Sportkunveno en Pekino

PROKSIMIĜAS la malfermo de la 11-a Azia Sportkunveno kaj la gastigantoj faras streĉan preparon por la solena kunveno. Ĝuste en tiu tempo mi vizitis la Vilaĝon de la Azia Sportkunveno, sidantan en la norda antaŭurbo de Pekino.

Tie estas la kultura kaj loĝa kvartalo en la konstrua skizo de la urbo Pekino. La kvara cirkloŝoseo antaŭ la Vilaĝo de la Azia Sportkunveno ligiĝas kun la ŝoseo reto en la urbo, per kiu oni povas atingi la Ĉefurban Flug-

havenon, Badaling, la Maŭzoleon de Ming-dinastio kaj aliajn vidindejojn. La loko estas bone provizita per akvo, elektro, gaso kaj aliaj vivbezonaĵoj.

Akompanate de laborantoj de la vilaĝo, mi vizitis konstruaĵojn, kiaj la oficejo de la vilaĝestro, pensionoj, manĝejo por sportistoj, novaĵa centro, centra ĝardeno, Kangle-palaco kaj aliaj akcesoraj ekipaĵoj.

En la vilaĝo kompreneble estas loĝejoj de sportistoj dum la sportkunveno. En la nordorienta parto

de la vilaĝo staras ses 13-etaĝaj kaj 18-etaĝaj domoj. Ili nombras 1 065 apartamentojn kun ok specoj de unu dormoĉambro kun unu gasteĉambro ĝis kvar dormoĉambroj kun du gasteĉambroj. Oni tenas unu domegon rezerva. Ĉiuj ĉambroj estas nove meblitaj. La ĉambroj por estroj de sportaj delegacioj estas ekipitaj per telefono, televidilo kaj komputila fin-instalaĵo.

La pensionoj havas kuracan, konkurs-informan, servan, korpoeckzercan kaj amuzan centrojn,

Parto de la Vilaĝo de la Azia Sportkunveno





Kunvenejo en la Konferenca Domo

kiuj donos al la sportistoj, trejnistoj kaj oficistoj diversajn servojn. La kuraca centro povos fari ordinaran kuracadon en la ĉina kaj okcidenta medicinoj, sanigan terapion, kaj ankaŭ la specialan ekzamenon pri virina sekso, malsano-preventon kaj higienan kontrolon pri manganĝoj.

Tamen, en la vilaĝo estas ne nur loĝejoj de sportistoj, sed ankaŭ 11 domoj de oficejo de la organiza komitato de la Azia Sportkunveno, novaĵa centro, hotelo por ĵurnalistoj, restoracio, drinkejo, magazeno, Kanglepalaco k.a.

La restoracio kun konstrua areo de 12 800 kvadrataj metroj, sidanta en la suda parto de la vilaĝo, povas servi samtempe al 2 500 homoj. Ĝi engaĝis superajn kuiristojn de Pekino kaj preparos tiom da pladoj por sportistoj, ke oni ne trovos samnomajn pladojn en menuoj por semajno. Inter la delegacioj partoprenontaj la sportkunvenon 18 venos el islamaj landoj, tial oni ankaŭ funkciigos en la vilaĝo la islaman restoracion, kie la manganĝoj estos preparitaj rigore laŭ islamaj moroj.

En la sudokcidenta angulo de la vilaĝo estas la oficejo de la organiza komitato de ĉifoja sportkunveno kaj la novaĵa cen-

tro. La unua etaĝo de la novaĵa centro estas poŝta halo kun marmora planko, kie oni servos al la ĵurnalistoj per poŝto, telefono, telekso k.a. Dekstre de la poŝta halo estas granda ŝtuparforma halo, kiu similas al malgranda teatro. Ĝi estas novaĵpublikiga halo. La centro havas 47 grandajn kaj malgrandajn kunvenejojn. Mal-

granda kunvenejo povas enteni nur 10 homojn, dum la plej granda 3 000 homojn. Granda kunvenejo estas ekipita per aparato de ok-lingva simultana interpreto.

La laborhalo de ĵurnalistoj okupas la plejparton de la dua etaĝo, kiu estas meblita per centoj da labortabloj kaj povas enteni pli ol 500 ĵurnalistojn. Sur ĉiu labortablo estas muntita telefono, per kiu oni povas rekte kontakti ajnan lokon de la mondo. En la halo oni baldaŭ muntos kablajn televidajn murojn kun areo de 40 kvadrataj metroj. Konkursoj en 11 ĉefaj stadionoj kaj sporthaloj estos senditaj ĉi tien per TV-kablo, dume ĵurnalistoj povos samtempe rigardi la konkursojn de 8 stadionoj kaj sporthaloj sur la TV-muro. Ĉe bultena ŝranko oni povos ricevi la plej freŝajn novaĵojn pri atingoj de la konkursantoj kaj materialojn pri sportistoj pere de komputila centro.

En la suda parto de la vilaĝo staras la Kvinkontinenta Hotelo,

La Kvinkontinenta Hotelo



tranoktejo de ĵurnalistoj. Ĝi, konsistanta el 13-etaĝa kaj 17-etaĝa konstruaĵoj, nombras 1 200 ĉambrojn. La hotelo havas ĉinan restoracion, kiu povas prepari pladojn de guangdong-a, shandong-a, sichuan-a kaj pekina gustoj. Krome ĝi havas ankaŭ eŭropan restoracion, kafejon, drinkejon, bankon, poŝtoŝtationojn, kaj aliajn servojn. Montrante junulinojn en ruĝa uniformo la akompananto diris al mi: "Ili estas servistinoj de la hotelo kaj nun lernas fremdajn lingvojn." La Pekina Turisma Servo speciale elektis kaj trejnis siajn laborantojn kaj lernantojn de fakaj lernejoj por doni fakan kaj norman servon al eksterlandaj gastoj.

Kangle-palaco, kie la sportistoj kaj aliaj personoj ripozos dum la sportkunveno, havas amuzan kaj sanigan funkcion. Ĝi, projektita kune de ĉinaj kaj nederlandaj fakuloj, estas la unua granda, sinteza endoma muzeo de Azio, kun internacie avangarda nivelo. Ĝi havas konstruan areon de 20 000 kvadrataj metroj. La tuta

konstruaĵo konsistas el du surteraj etaĝoj kaj unu subtera etaĝo. Ĝi povas samtempe servi al pli ol 3 000 homoj. La plej aparta konstruaĵo de la palaco estas akva muzeo. Ĉi tie estas ankaŭ naĝejo kun artaj marondoj, sunuma lito, akva glitejo, aerŝpruca masaĝa banujo, artefarita strando k.a. Loĝante en la palaco oni povas tutjare ĝui la plezuron de tropika mara klimato. Krome, en la palaco estas ankaŭ ejoj por kegloludo, tablotenis, teniso, disko-balo, ŝakludo, kartludo, muzikludo, pentrado k.a.

La centra ĝardeno sidanta en la centro de la vilaĝo estas ĉinstila ĝardeno de artefaritaj montetoj kaj akvo kun plantaĵoj kiel la ĉefa. Kiel giganta verda juvelo ĝi inkrustiĝis en la centro de la gigantaj, altaj domoj. Laŭ pado kun pavimo el ŝtonpecoj mi iris okcidenten. En la verdaj cipresoj duonkaŝas sin kiosko kun okangula, malakit-verda tegmento el vitro. Apud ĝi kreskas verdaj bambuoj kaj metasekvojoj (viva fosilio). En la orienta parto de la

centra ĝardeno, ginkoj, mirtoj (*Lagerstroemia indica*), lilakoj, rampaj cipresoj k.a. harmonie kreskas kaj formas belan pejzaĝon. En la sudo la milde leviganta gazono estas punktita de keteleroj (*Keteleeria fortunei*), pinoj, cipresoj k.a. kio impresas per vasteco kaj kvieto.

La oficejo de la vilaĝestro situas norde de la centra ĝardeno, kie la vilaĝestro intervidiĝos kun estroj de sportaj delegacioj kaj aliaj gastoj kaj prezidos regulajn kunvenojn de la delegaciaj estroj. Antaŭ la oficejo sterniĝas placo, kie oni hisos la naciajn flagojn de partoprenantaj landoj. La 8-an de septembro 1990, kiam la vilaĝo ekfunkcios oficiale, ĝi gastigos ĉ. 6 000 sportistojn, trejnistojn kaj oficistojn el 39 landoj kaj regionoj de Azio.

Post vizitado de la vilaĝo, mi vidis tra tiu grandioza belaspekta konstruaĵaro ne nur la intelekton kaj kreivon de la konstruantoj, sed ankaŭ ilian varman koron al la 11-a Azia Sportkunveno kaj al la disvolviĝo de la azia sporto. Ili esperas, ke la aziaj sportistoj kreos tie novajn aziajn, mondajn rekordojn. ■

INTERVJUOJ

Antaŭ la 11-a Azia Sportkunveno

— Intervjuo de tri famaj ĉinaj gimnastoj

de TIAN YU

TIO estas trejna loko de la Ĉina Gimnastika Teamo, en la sudoriento de Pekino. La gimnastoj streĉe sin trejnas. En la orienta halo, sur duringoj, ĉevaloj kaj verdaj tapiŝoj, la junuloj, nudaj je la supra korpo, entuziasme sin ekzercas. En la okcidenta halo knabinoj, kiel hirundoj, viglas sur la 4 ŝtupaj paraleloj tie starantaj, dum kelkaj aliaj transkapigas sur traboj. Ofte aŭdiĝas laŭ-


taj voĉoj de trejnistoj, kiuj instruas la gimnastojn.

Inter la sportistoj gimnastoj Li Jing, Li Chunyang kaj Fan Di estas ĉampionoj de la 25-a Monda Gimnastika Ĉampioneca Konkurso (MGĈK). Nun antaŭ la 11-a Azia Sportkunveno okazonta septembre de 1990 en Pekino, ili komprenas, ke ilia tasko estas kaj glora kaj peza.

Mi trovis Li Jing ĉe duringo. Mi

ja intervjuis lin post la 25-a MGĈK. Tiam li donis al mi profundan impreson per siaj juna mieno kaj rideto sur la vizaĝo. Sed ĉifoje ŝajnas al mi, ke li fariĝis meditema. Kun la okuloj negrandaj, sed ĉiam larĝe malfermitaj kaj lipoj firme fermitaj, li silente faris la ekzercadon.

Lin salutinte, mi diris al li, rigardante lian nudan dorson abunde ŝvitantan:



Li Jing

“Vi maldikiĝis.”

“Ĉu? Ĉar estas tro laca.”

Li tiel respondis al mi. Kaj poste, sen diri ion alian, li turnis sin por preni la ringojn per la manoj kaj sin levis en ortakruca formo. Desaltinte de la duringo, li spiregis. La duringado estas sporto de atletoj, ĉar pendanta en la aero, oni sin tenas sole per la fortoj de la manoj, kaj ĉiu movo estas malfacila. Anhelinte, li turniĝis al mi kaj diris:

“En la lastaj tagoj, mi faris nur tiun ĉi movon. Pro manko de forto mi devas plifortigi min en la sportoj de fortoj kiaj duringado kaj ĉevalado.

“En la 25-a MGĈK, krom la ora medalo de la konkurso de paralelado, mi gajnis ankaŭ la trian lokon de kunmetita individua konkurso. Tamen, tio ne signifas, ke mi estas forta en ĉiuj disciplinoj. Fakte la japana teamo, nia forta rivalo en la azia sportkunveno, estas preskaŭ samnivela al ni. En la 25-a MGĈK, mi superis la trian lokon de kunmetita individua konkurso nur per 0.05 poento pli multa ol la

japana gimnasto, kiu gajnis la 4-an lokon. Tiu distanco estas facile atingota, ĉu?”

Mi kapjesis kaj diris al li:

“Kiel peniga estas via ekzercado!”

“Jes, estas tre peniga la ekzercado pri speciala sporto,” diris Li Jing kun rideto. Montrante per fingro la duringon, li daŭrigis:

“La movo, kiun mi ĵus faris, postulas stabilecon kaj malrapidecon por montri la fortojn. Pro manko de forto, mi estas febla en duringado. Mia trejnisto estas severa en mia duringado. En unu trejna horo, mi devas pli ol 100 fojojn ripeti la saman movon. Pro lacego kaj enuo, mi ĉesis por iom promeni kaj pripensi.”

Frapante lin je la ŝultro, mi diris al li:

“En la azia sportkunveno vi certe sukcesos, dank’ al via diligenteo.”

Nenion dirinte, li nur ridetis al mi.


Turniĝinte, mi vidis Chunyang. En la Ĉina Gimnastika Teamo, li estas granda knabo, tipa guangdong-ano. Kun elstaraj zigomoj, profundaj orbitoj, longa kaj maldika vizaĝo li aspektas pli sagaca kaj matura ol Li Jing. Li estis faranta preparajn movojn kaj ni komencis interparolon.

“Chunyang, pri kio vi pensas nun, kiam restas nur pli ol 100 tagoj antaŭ la azia sportkunveno?” mi demandis.

“Kompreneble, mi pensas pri

io. Kvankam mi estas veterana sportisto en nia teamo, tamen estas la unua fojo por mi partopreni la azian sportkunvenon. En la 25-a MGĈK, mi gajnis la oran medalon de la rekado. Ĝenerale dirite, mi devas esti kontenta, tamen, la azia sportkunveno estas tute alia afero. Mi deziras belan sukceson en mia gimnastika historio,” li daŭrigis. “Ĉu vi scias, ke mi faris grundgimnastikon de 3 cirkloj en la Ĉefurba Sporta Halo, Pekino junie de 1988? Mi estas fiera pro ĝi, ĉar ĝi estas rigardata kiel kulmino de la grundgimnastiko. Sovetia sportisto iam provis ĝin, sed poste li forlasis ĝin. Timante eventualan malsukceson, neniu faris ĝin en oficiala internacia sportkunveno. Post kelkmonata ekzercado, mi sukcesis kaj volas provi ĝin en la konkurso.

Li Chunyang



Pri tio mia teamo konsentis. Mi sukcese faris ĝin en la konkurso inter ĉinaj kaj sovetiaj gimnastoj. Kiel fiera mi estis! Mi pensis, ke ankaŭ la spektantoj estis kontentaj.”

Je tio, li ŝanĝis la temon kaj diris al mi:

“Mi parolis al vi nur pri mia propra animstato. Mi volas preterlasi neniun ŝancon, neniun malfacilegan movon, kaj plie, la ĉi-foja konkurso estos en Pekino.”

“Kiel iras via ekzercado?” mi demandis lin.

Iom pripensinte kun mallevita kapo, li respondis al mi:

“Por mi la ĉefa celo de la trejnado estas pliiĝi miajn fortojn. Mi kaj Li Jing havas la saman problemon, t.e. mankon de forto. Post ekzercado de duringado nun mi povas fari la movon, kiu postulas grandan forton, kiel ‘sinteno en kruca formo post malrapida turniĝo’, sed antaŭe ne. Poste, mi devas altigi la nivelon de kunmetita individua konkurso. Kiel mi ĝojos, se mi sukcesos en ĉiuj disciplinoj en la azia sportkunveno!”

“Vi certe sukcesos,” mi diris, rigardante liajn okulojn plenajn de espero.

En la okcidenta halo mi trovis Fan Di ĉe la tria ŝtupa paralelo. Gvidate de sia trejnisto, ŝi ripetade faris transsalton de Tkaĉev sur pli alta lignostango de la ŝtupa paralelo, viran movon sur reko. Ne volante ŝin ĝeni, mi rigardis apude.

Fan Di estas saĝa knabino el Ŝanhajo. Dum sia 6-jara ekzercado en la ŝtata teamo, ŝi reiris hejmen nur unufoje por 6 tagoj. En tiuj 6 jaroj, ŝi kreskis, altigis la teknikon kaj fariĝis monda ĉampionino. Nun, pri kio ŝi pensas antaŭ la 11-a Azia Sportkunveno?

Je mia demando, ŝi donis tute simplan respondon:

“Diligente labori!”

Mi scias, ke post tiu ĉi simpla frazo sin kaŝas ŝia neesprimebla peniga laboro.


Huang Yubin, ŝia antaŭa trejnisto, estis monda ĉampiono de rekado. Li enkondukis grandan turniĝon de la vira rekado al la virina

ŝtupa paralelado. Tio ne estas facila. Apud la reko troviĝas nenia baraĵo, sed por la ŝtupa paralelo la afero estas tute alia: Paralele sub la alta lignostango staras la malalta. Tamen, Fan Di komencis sian peneman kaj novan provon, gvidate de trejnisto Huang. Ĉiutage, ŝi devis fari 500 grandajn turniĝojn. Pro tio ŝiaj delikataj manoj pleniĝis de kaloj. Finfine, ŝi sukcesis! Ŝi bele faras la grandan turniĝon sur la ŝtupa paralelo. Antaŭ pli ol 6 monatoj, kiam ŝi fiksiĝis sur la tero kiel najlo, desaltinte de sur la ŝtupa paralelo en Stuttgart en FR Germanio, iu internacia juĝisto kriis: “10 poentoj!” Kaj aliaj 6 poentjuĝistoj samtempe donis al ŝi 10 poentojn. Tiele, la 16-jara Fan Di fariĝis monda ĉampionino.

Poste, trejnisto Yang Qinghua anstataŭis ŝian antaŭan trejniston. La nova trejnisto havas novan artifikon. Krom la granda turniĝo, li aldonis la transsalton de Tkaĉev sur reko, tipan viran movon. Fan Di akceptis ĝin. Tiel, nia monda ĉampionino ekripetadis tiujn monotonaĵojn kaj enuigajn ekzercojn, komprenante, ke la malfacilaj, brilaj kaj plej avangardaj movoj konsistas el tiuj monotonaĵoj.

La ideo por informiĝi pri ŝia penso pri la azia sportkunveno venis al mi en la kapon, do mi diris al ŝi:

“Vi certe estos ĉefa sportistino en la azia sportkunveno.”



Fan Di

Ŝi jetis rigardon al mi kun memfido sur la vizaĝo, kvazaŭ ŝi demandus: “Ĉu valoras demandi pri tio?”

“Kio estas via fortaĵo en konkursoj?” mi daŭrigis.

“Malpli da vundoj!” ŝi rekte respondis al mi ĉifoje.

“Kiel pene vi ekzercas vin!” mi laŭdis ŝin.

Sed ŝi petole diris al mi:

“Ĉu? Sed mi ne estas diligenta. Ĉiutage mi ekzercas min, sed nur unufoje diligente por la 10 fojoj. Eble, vi vidis ĝuste tiun ĉi fojon.”

Mi ne plu demandis, ĉar la knabino jam diris tion, kion ŝi pensis. Ŝi, samkiel ĉiuj aliaj sportistoj ŝvitantaj en la halo, bone scias la signifon de la 11-a Azia Sportkunveno! ■

De fiŝrigardado ĝis sonĝo pri papilio

de HOU JUELIANG

KIAM mi lernis en mezlernejo, hazarde mi legis rakonton pri Ĝuangzio en periodaĵo: Foje Ĝuangzio kaj lia amiko Hujzio rigardis fiŝojn surponte. Ĝuangzio ĝoje diris: "Tiuj ĉi fiŝoj libere naĝas. Kiom gajaj ili estas!" Hujzio ne aprobis lian opinion: "Vi ne estas fiŝo, kiel vi povus scii ilian gajon?" Ĝuangzio refutis: "Vi ne estas mi, kiel vi povus scii, ke mi ne scias ilian gajon?"

La dialogo estas interesa, logika kaj pensiga. Leginte tiun ĉi rakonton, mi forte deziris legi lian verkon. Kelkajn jarojn poste, mi legis lian verkon *Ĝuangzio* en universitato. Ĝi kun cent mil ideogramoj estas filozofia libro, kiu plene prezentas lian filozofian penson; kaj ankaŭ estas brila literatura verko, kiu eksplikas profundan filozofian penson per fabloj. La lingvo estas bela, imagoriĉa, tropo trafa kaj priskribo viveca. Oni povas diri, ke li estis literaturisto-filozofo. Liaj verkoj estas nek enuigaj nek sekaj, sed altiras legantojn per romantika nuanco.

Ĝuangzio (ĉ. 328-295 a.K.) vivis en malriĉa familio. La familio vivis de pruntita greno, kaj li portis pajlŝuojn kaj flikitan veston. Li iam estis ŝtatoficisto pri uruŝia ĝardeno. Poste li vivis ermite kaj okupiĝis pri instruado kaj verkado. Hujzio estis lia sola amiko. Ĝuangzio, lernema, legis ĉiujn troveblajn librojn kaj aparte ŝatis la verkojn de Laŭzio, fondinto de taoismo. Tial li fariĝis daŭriganto de la taoisma afero.

Li disvolvis la filozofian penson de Laŭzio. Laŭzio diris, ke "tao" naskis la universajn estaĵojn kaj estas nemateria "spirita koncepto". Ankaŭ Ĝuangzio samopiniis kun Laŭzio pri tio, tamen li opiniis, ke "tao" estas materia "ĉi-o", kiu naskis la estaĵojn. "Ĉi-o" estas senforma materio en la mondo, kiu jen kondensiĝas, jen malkondensiĝas. Kiam ĝi kondensiĝas, estaĵo formiĝas; kiam ĝi malkondensiĝas, estaĵo ne ekzistas kaj denove fariĝas "ĉi-o". Surbaze de la koncepto pri kondensiĝo kaj malkondensiĝo de "ĉi-o", li klarigis la naskiĝon, disvolviĝon kaj pereon de ĉiuj estaĵoj, kaj samtempe certigis, ke ankoraŭ ekzistas "ĉi-o", kvankam estaĵo jam ne ekzistas. Per tio li konfirmis la konstantan ekziston de materio.

Estas menciinde, ke Ĝuangzio jam konis la senlimecon de tempo kaj spaco, kio levis la pensadon de homoj al nova nivelo. Kiel naskiĝis la materia mondo? Kiel ĝi disvolviĝos kaj ŝanĝiĝos? Tio povas esti vidita en la senfine malproksimaj pasinteco kaj estonteco. Ne nur pasinteco, sed ankaŭ estonteco estas senlima. Li diris, ke en la mondo la regno estas kvazaŭ grajno en grenejo, kaj ankaŭ la granda mondo estas malgranda en la universo, kvazaŭ formikejo en granda lago. Tiuj tropoj eble ne estas trafaj, tamen ili klare montras al ni, ke li jam konis la senlimecon de la universo. Antaŭ Kristo, kiam ne estis evoluinta la naturscienco, estis katenita la kapablo de homoj por koni la mondon. Ili neniel povis koni sekreton de la univ-

erso, nek la senlimecon de tempo kaj spaco. Estas laŭdirinde, ke Ĝuangzio konis kaj malkovris tion.

La malforta flanko de Ĝuangzio filozofie estis lia relativismo. Li rekonis la transformiĝon de afero. Li opiniis, ke putra afero povas transformiĝi en mirindan, kaj la mirinda en putran. Sed li neis la kondiĉon de la transformiĝo, opiniante, ke la afero povas transformiĝi senkondiĉe. Rezulte de tio, li ne povis vidi la diferencojn inter aferoj nek tiun inter "pravo" kaj "malpravo". Li trovis nenecesa distingi pravon disde malpravo. Laŭ li, pravo kaj malpravo ne povas esti klare distingitaj. Konfuceanoj kaj mozianoj disputis inter si por distingi, kiu pravas kaj kiu ne. Ĉiu el ili havis sian propran kriterion de pravo kaj malpravo, kaj la disputo, laŭ Ĝuangzio, ne povis veni al konk-ludo. Li ne rekonis la ekziston de pravo kaj malpravo, nek la objektivan kriterion por prijuĝi ilin, kaj li faris sofismon. Li diris, ke pro dormado sur malseka loko homo malsaniĝas je la lumboj kaj kruroj. Ĉu tio okazas ankaŭ al kobitido? Homo timas, kiam li restas sur arbo. Ĉu ankaŭ simio sentas tion? Nu, kiu el ili plej bone scias, kiu loĝejo en la mondo estas la plej taŭga? Homo manĝas kuirajn, cervo herbon, vermo koton kaj strigo muson. Kiu el ili scias, kio estas bongustaĵo en la mondo? Maoqiang kaj Liji estis belulinoj en la antikveco, tamen ekvidinte ilin, timigite la fiŝoj fornaĝis, birdoj haste forflugis kaj cervoj rapide forkuris. Kiu el ili scias, kio estas beleco?

Laŭ Ĝuangzio, same kiel por bongustaĵo kaj beleco, en la mondo ne estas identa objektiva kriterio ankaŭ por pravo kaj malpravo. Oni ne povas distingi ilin, kaj ĉiuj juĝas ja nur laŭ sia propra vidpunkto.

Laŭ sia relativisma penso, Ĝuangzio havis eksterordinaran opinion pri vivo kaj morto. Ĉe li ne ekzistis la diferenco inter vivo kaj morto. Li egaligis vivon kaj morton. Vivo signifas morton kaj morto vivon; la homa vivo estas nenio alia ol sonĝo. Vivo estas la komenco de morto, kaj morto la komenco de vivo. Li diris, ke la homa vivo estas la kondensiĝo de "ĉi-o". Kiam "ĉi-o" kondensiĝas, homo vivas; kiam "ĉi-o" malkondensiĝas, homo mortas. Ĉar vivo kaj morto de la homo estas nenio alia ol kondensiĝo kaj malkondensiĝo de "ĉi-o", tial oni ne devas maltrankviliĝi pro morto. Li eĉ opiniis, ke morto estas pli bona ol vivo, kaj ke oni ne devas malĝoji, sed anstataŭe, gratuli pro morto. Historia libro notas, ke kiam lia edzino mortis, lia amiko Hujzio venis kondolenci lin, tiu ĉi devus funebri pri ŝi kun larmoj, sed male, li kantis frapante pelvon. Tio ege surprizis la amikon. Ĝuangzio diris, ke la mortinto ne estas subpremata de regantoj, nek suferas de laco en la jaro, kaj ke li estas liberigita de ĉia kateno kaj pli feliĉa ol reĝo. Ĝuangzio malkontentis pri la malluma realo, tial li prikantis morton.

Pro ekstrema pesimismo Ĝuangzio ne vidis la estontecon kaj apatie traktis la vivon. Li deziris sin liberigi de ĉia ĉagreno en la homa mondo kaj ĉasi absolutan spiritan liberecon. Pro tio li subtaksis profiton kaj monon, ne avidis enoficiĝon. Informiĝinte, ke li estas talentulo, la reĝo de Chu-regno speciale irigis al li senditojn kun mono, por inviti lin servi kiel ĉefministro, sed la senditoj estis mokitaj kaj forpeltitaj. Hujzio iam estis ĉefministro en Liang-regno. Foje, Ĝuangzio vizitis Liang-regnon. Timante perdi sian dignon, Hujzio sin kaŝis

por eviti Ĝuangzion. Fine ili renkontiĝis. Ĝuangzio kun moko rakontis: "En la sudo estas fenikso. Ĝi flugas de la suda maro al la norda. Sur la longa vojo ĝi ripozas nur sur sterkulio, manĝas nur bambusemojn kaj trinkas nur el dolĉa fonto. Kiam ĝi superflugis iun arbon, akcipitro sur la arbo, kun morta muso en siaj ungoj, senvole kriis pro timo, ke la fenikso forrabos la muson." En tiu fable Ĝuangzio komparis sin mem kun la fenikso, Hujzion kun la akcipitro kaj la ĉefministrecon kun la morta muso. Li faris fortan mokadon kaj montris sian noblecon.

Ĉasante ne enoficiĝon sed senzorgecon, Ĝuangzio penis forgesi ĉion de la homa mondo kaj atingi la plej altan animstaton forgesi kaj la aferon kaj sin mem, t.e., ne ĝoji pro vivo, nek malĝoji pro morto. Sed ĉio ĉi estis malfacile realigebla. Kvankam li estis grandanima kaj ĉiam indiferenta pri vivkondiĉoj, tamen iam okazis, ke li sentis maltrankvilon kaj ne povis eskapi el kontraŭdiroj en la homa mondo. Kia homo li fariĝu, kaj kian sintenon li alprenu al la homa mondo? Ĉu estu pli bone konduiti saĝe aŭ ŝajniĝi sin malsaĝa? Tiuj demandoj neniam forlasis lin. Foje, li kaj liaj lernantoj iris al arbaro. Vidinte, ke iuj arboj estas forhakitaj, dum aliaj ne, unu el la lernantoj demandis lin: "Kial iuj arboj ne estas hakitaj?" Ĝuangzio respondis: "Ĉar tiuj arboj taŭgas por nenio." Ili trairis la arbaron kaj tranoktis ĉe amiko. En la hejmo de la amiko brediĝis du anseroj, unu povis gaki, kaj la alia ne. La amiko buĉis la lastan por regali la gastojn. La lernanto demandis: "Kial oni mortigis ĉi tiun anseron?" Ĝuangzio respondis: "Ĉar ĝi ne povas gaki, ĝi do utilas al nenio." La lernanto dubis: Oni forhakis la utilajn arbojn, oni ne buĉis la utilan anseron. Ĉu oni estu homo talenta kaj utila, aŭ sentalenta kaj senutila? Ĝuangzio respondis, ke pli bone oni estu nek talenta nek sentalenta.

Pro la socia mallumo Ĝuangzio havis skeptikisman penson. Same kiel Laŭzio, ankaŭ li pledis por "forigo de sanktuloj kaj inteligenteco", kaj "trakti la ŝtatajn aferojn naturalisme kaj sendevige". Li opiniis, ke saĝo estas senutila kaj alportas malbonon. Por sin gardi kontraŭ ŝtelo, saĝulo multe klopodas kaŝi siajn trezorojn en keston, firme ŝnurligas kaj ŝlosas ĝin. Sed kio fine? Per sia saĝo li ja helpas ŝteliston. Entrudiĝinte, la ŝtelisto simple forportas la keston. Kian do utilon la saĝo havas? Ankaŭ la "sanktuloj" estas senutilaj. La reĝo Tianchengzi surtronigis per uzurpado. Li ŝajnis sanktulo, sed fakte li estis granda rabisto. Tio estis ege maljusta. Ĝuste pro la ekzisto de sanktuloj kaj inteligenteco, la mondo dronas en granda malordo. Se oni deziras pacon en la mondo, oni devas forigi sanktulojn kaj inteligentecon. Li asertis: "Se sanktuloj ne mortos, rabistoj ne malaperos."

Bedaŭrinde, Ĝuangzio esprimis sin nur en la malluma socio por vekti homojn kaj ne povis montri al ili perspektivon. Ne povante vidi vojon antaŭ si, li povis nur vidi malantaŭen. Li fantaziis "moralan mondon", t.e., idealan antikvan socion. En tiu socio ĉiuj vivas laŭ sia moraleco; ĉiuj laboras; ĉiuj "sin vivtenas per tek-sado kaj plugado"; ĉiuj "eklaboras ĉe sunleviĝo kaj ripozas ĉe sunsubiro"; ĉiuj vivas pace inter si, sen sektoj kaj rangoj. Ĉiuj vivas liberan vivon, ne katenitaj de humaneco, moraleco, etiketo kaj intelekto; ĉiuj vivas kvietan vivon, ne ĉasante profiton. Tiu "morala mondo" estas nur utopio. Ĝuangzio ne povus vivi en fantazio kaj dronis en mallumo, kiam li revenis de fantazio al realeco. Li dubis pri ĉio, fine eĉ pri si mem. Foje li sonĝis, ke li fariĝis fluganta papilio. Vekiĝinte li ekdubis: Ĉu mi fariĝis papilio en mia sonĝo, aŭ la papilio fariĝis Ĝuangzio en sia sonĝo?

Kompreneble, la penso de Ĝuangzio havas simplan dialektikon, kiu donas gravan edifon al posteuloj. ■

Kolektaĵo amuza kaj pensiga


de SABINE FIEDLER (Hungario)

ORANĜA OMBRELO. Mikronoveloj. Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1986. 148. Prezo por Hungario: 50,-forintoj.

La libreto enhavas 40 t.n. mikronovelojn de 35 diversaj ĉinaj aŭtoroj. Tiuj estas mallongaj — parte eĉ malpli ol du paĝojn ampleksaj — rakontoj. Ili kondukas al vivmaniero kaj kulturo nekonataj por la plej multaj inter ni. Sed samtempe ili temas pri okazintaĵoj, spertoj kaj ecoj ĉiutagaj kaj komunhomaj, kiel malsano, edziĝo sen amo, malkonsento pri infana edukado aŭ morto. Multaj el tiuj mikronoveloj inkluzivas profundan veron de la vivo kaj instruan ideon: personoj kun abomenindaj ecoj estas hontigitaj profunde en la fluo de la eventoj; herooj kun estimindaj ecoj fariĝas virtaj ekzemploj.

Tiel ni renkontas la amarigitan edzon de virino malsana jam de multaj jaroj. Li revidas konaton de pasintaj tagoj, kiu memorigas lin pri la tempo, kiam la edzino lin ofereme flegis dum malsano. La renkontiĝo ege pensigas lin kaj kaŭzas, ke plena de amo kaj komprenemo li denove zorgas pri sia edzino. Ni renkontas junulon, al kiu vendistino redonis tro multe da mono pro malatento. Li ne protestas kaj foriras. Sed poste, kiam honesta trovinto alportas al li la perditajn sportŝuojn, li pentas kaj reiras al la vendejo... Ni

Ilustraĵo por la libro



renkontas viron, kiu ne ŝajnigas esti alt-rangulo antaŭ knabino — kiel amiko konsilas al li — sed konfesas esti simpla laborulo kaj kiu tamen (aŭ eble eĉ tial!?) akiras la amon de la knabino. Kaj povas esti, ke ni renkontas



La kovrilo de "Oranĝa Ombrelo"

nin mem en tiuj rakontetoj kaj leginte ilin ni pripensas la propran konduton.


La lingvaĵo estas flua kaj viva. Malgraŭ la multnombro da aŭtoroj kaj temoj la libro prezentas lingve harmonian tuton. Mi ĝin rekomendus precipe al la komencantoj de Esperanto: ili facile komprenos la enhavon kaj rapide pliampleksigos siajn leksikonojn serĉante en vortaro eĉ nur du-tri vortojn po rakonto. Ankaŭ klarigoj pri tipaj aferoj de la azia kulturfere kontribuas al la facila komprenado, kiel ankaŭ la beletaj desegnaĵoj, kiuj krome donas al la libro suplementan, laŭaspektan ĉarmon. ■

Tri urbetoj en orienta Yunnan

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN

LA vojo Wuchidao etendiĝas suden laŭ Wumeng-monto kaj Niulan-rivero kaj eniras la trafikajn urbetojn Huize, Xuanwei kaj Qujing en orienta Yunnan. La urbetoj situas meze de Diansong-altebenaĵo. En la antikveco la loko, grava strategie, estis longe okupata



gastejo ni ĉiuj sidis en vatitaj litkovriloj. Frumatene de la sekva tago ni malsupren veturis en nebulo laŭ kota vojo kaj alvenis al Huize, la kuprolando de Wumeng.

Huize kun interkrucitaj riveroj estas konata kiel fama akvolando de Wumeng. En la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K.—23 p. K.) ĝi estis sub

de klanoj en sudokcidenta Ĉinio. En la periodo de Tri Regno (220-280) Zhuge Liang, ĉefministro de Shu-regno, militekspediciis suden al Qujing, komandante tri kolonojn da militistoj, kio mildigis la streĉitecon de la naciaj rilatoj. Dank' al la Suda Silka Vojo, oni dissemis en Qujing kaj ĝia ĉirkaŭaĵo avangardajn produktajn teknikojn kaj kulturon, tiel ke Qujing fariĝis loko kompare frue ekspluatata en Yunnan-provinco.

KUPROTRANSPORTA VOJO

Dahailiangzi en Huize estas la ĉefa pinto de Wumeng-monto. "Dahai" en la ji-a lingvo signifas "super ŝtuparo". Ĝi, pli ol 40 km longa, impona kaj majesta, staras sude de la guberniurbo de Huize.

Apud Dahailiangzi ĉe la vojoj

tie kaj tie lokiĝas domoj masonitaj per ŝtonoj kaj tegmentitaj per maldikaj ŝtonplatoj. La domoj kaj monto harmonie kunfandiĝas. Nur tiuj, kiuj venas el urboj, povas ĝui la montan imponecon. Irante sur flava herbejo, ni ĝuis la belan pejzaĝon de Dahailiangzi. Sur montodeklivo sterniĝas vasta kaj ebena paŝtejo. Super ĝi ŝvebis nuboj, kiuj jen kolektiĝis, jen disiĝis. Kaj la monto variis en la konturo. En vento aŭdiĝis jen laŭta, jen mallaŭta paŝtista kriado. Ankaŭ ni ekkriis de ĝojo plengorĝe, sed, oni ne sciis, kial la monto donis nenian eĥon. La suno subiris kaj la neĝkovrita montosupro malheliĝis. Subite hurlas venteĝo kaj ni hastis malsupreniri. Kiam ni atingis la monttalion, nin trafis forta pluvo. Brilis fulmo kaj bruis tondro. La temperaturo abrupte malaltiĝis. En la

Tanglang-gubernio. Tiutempe la bronzaĵoj, produktitaj en Tanglang kaj Zhuti, famis tra Ĉinio. En la historio en Huize funkciis monerfarejo. Jam en Han-dinastio oni ekmuldis bronzaĵon en Huize kaj la muldado pli prosperis en la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Qing (1644-1911). En 1522-1566 oni speciale muldis moneron pezan je 40 kg. Ĝi, kiel emblemo, estis pendigita super la pordo de la monerfarejo.

En la Kultura Domo de Huize estas eksponata antaŭ nelonge malkovrita steleo pri rekonstruado de poŝtvojo en Qing-dinastio. Sur la steleo legiĝas: "La urbo Tanglang estas vasta kaj limtuŝas Sichuan kaj Guizhou. Pro tio en ĝi viglas komerco. Ĉiujare ĝi donas al la kortego milionojn da kg da kupro kiel tributon. Tiukaze la vojo





Dahaliangzi

Antikva bronza elefanto en Huize




Poŝtstacio sur la antikva vojo





La guberniurbo de Qujing

Preparado de ŝinkoj





Ce strato de Qujing

estas tre grava por transporti kupron." En 1662-1722 oni ĉiujare transportis de Huize milionojn da kg da kupro al Pekino por muldi monerojn, kaj krome, en ĝi fondiĝis la burooj Baoyun kaj Baodong. Tie laboris 1 500 monfaristoj kaj funkciis pli ol 70 muldfornoj. Por ekspluati kaj transporti kupron Huize de longe ofte kontaktiĝis kun aliaj lokoj kaj estis grava gubernio ĉe la vojo Wuchidao. En Qing-dinastio almenaŭ kvar vojoj kondukis de Huize al Sichuan kaj Guizhou. Manko de transportaj fortoj estis granda malfacilo por kontinue transporti kupron al la ĉefurbo. De Qing-dinastio Huize havis oficialajn ĉevalkaravanojn kaj la ĉevaloj estis aĉetitaj per mono prunteprenita de ŝtata tenejo. Oni disponigis la ĉevalojn al koĉeroj. La monsumo por aĉeti la ĉevalojn estis amortizita el transporta enspezo. Dank' al tio oni ne nur ŝparis monon, sed ankaŭ evitigis alispecan perdon de kupro: ĉar tiam la koĉeroj ofte ĉesis transporti kupron survoje, neelportante la penigan laboron. Tiam Huize-anoj prenis salon el Sichuan. Tio donis al la koĉeroj bonan ŝancon akiri pli da mono, se ili revenos kun kar-

avano portanta salon.

Kun la prospero de kuprotransporto multaj alilokanoj transloĝiĝis en Huize, tiel ke vige disvolviĝis en ĝi samlokanaj domoj kaj butikoj. Aperis ankaŭ multaj grandaj komercistoj. Nun en ĝi la stratoj estas racie aranĝitaj. Iuj loĝantoj vivas ĉe stratoj kaj plejparto de ili en domoj kun korto meze. En la kortoj kreskas malsamaj floroj. En la Okcidenta Strato de la guberniurbo ni vizitis rekonstruatan Jiangxi-an samlokanan domon, kiu aperis en 1711. Siatempe ĝi servis kiel pasloĝejo por komercistoj. Tie estas originala granda teatro. Kun turosimila portalo kaj kvinoblaj kornicoj la teatro estas bone prilumata. La tegmentrandoj estas aranĝitaj sur sama nivelo. Kiam pluvas, oni vidas, ke pluvakvo kvazaŭ falas sur la scenejon, sed fakte, ekster ĝin laŭ la tegmentrandoj.

ŜINKOJ DE XUANWEI

La ŝinkoj de Xuanwei estas preparitaj el porkoviando de Weining. Weining kaj Xuanwei estas ligitaj per poŝta vojo kaj regas facila trafiko inter ili.

Ŝinkoj de Xuanwei ekvendi-



Kopio de la skribaĵo sur la steleo Cuanbaozi

ĝis ne malpli frue ol en Ming-dinastio. Unue oni vendis ilin en Chengdu kaj Kunming. En la lastaj jaroj de Qing-dinastio ili vendiĝis ankaŭ en komerchavenoj ĉe la marbordo. La ŝinkoj estas salaj, bonodoraj kaj dolĉetaĵoj. En Hongqiao-vilaĝo proksime de la guberniurbo ni intervjuis pli-ol-40-jaran Lü Zefu, majstron de ŝinkopreparado. Li lernis nur en elementa lernejo. En la infanaĝo li lernis de sia patro ŝinkopreparadon. Nun li havas duetaĝan domon destinitan por sekigi ŝinkojn. Li kaj lia edzino ĉiujare preparas ĉ. 2 000 ŝinkojn, ĉiu meznombro pezas 9 kg. En

aferoplena tempo ili havigas al si dungitojn. La ŝinkoj preparitaj de ili estas fajnaj. Lü Zefu konigis al ni, kiel prepari ŝinkojn. Por prepari ilin oni devas atente elekti materialojn kaj zorgeme prilabori. La preparo daŭras duonjaron. Unujara ŝinko estas aparte bonodora. Iliaj ŝinkoj plejparte vendiĝas en Birmo, Singapuro, Hongkong kaj Aomen. Ofte okazas, ke oni faras mendon anticipe.

Xuanwei estas fama ne nur pro la ŝinkoj, sed ankaŭ pro sia ĉevalkaravano. La tieaj ĉevaloj transportas ne nur varojn, sed ankaŭ homojn. Tie preskaŭ ĉiuj veturas per ĉevalĉaro. La guberniurbo distancas de la stacidomo je ĉ. 7 km. Unudirekta kuro de ĉaro postulas pagon de nur 0.3 juano. Ankaŭ ni veturis foje en ĉaro por plezuro.

ZHUGE LIANG KAJ MENG HUO

Apud ŝoseo norde de la urbeo Qujing staras pli-ol-20-metre longa reliefo "Zhuge Liang kaj Meng Huo", kiu prezentas kiel batalis kaj paciĝis Zhuge Liang kaj Meng Huo en la nacimalplimulta regiono en sudokcidenta Ĉinio.

En 223 forpasis Liu Bei, imperiestro de Shu-regno. Profitante la okazon, la klanoj en la regiono starigis sian lokan potencon kaj ne plu submetiĝis al Shu-regno. Qujing kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estis okupataj de klanestro Meng Huo. Li unuiĝis kun aliaj klanestroj por rezisti kontraŭ Shu-regno. Minacate de Wei-regno en nordo kaj Wu-regno en oriento, Shu-regno alfrontis seriozan situacion. Sub tiu situacio Zhuge Liang senhezite faris decidon unue militiri al la sudokcidento por forigi la danĝeron post sia dorso.

Marte de 225, tri kolonoj gvidataj de Zhuge Liang militiris suden laŭ la akva vojo de Wuchidao. Maje la armeo trans-

iris Jinsha-riveron kaj batalis kontraŭ Meng Huo plurfoje. Prenante la politikon "psikologia atako unue kaj militpreno de loko due; psikologia taktiko unue kaj manovro de trupoj due", Zhuge Liang venkis la klanestrojn en la sudokcidento. Post kiam la suden-ekspediciaj trupoj kolektiĝis en Qujing, ili revenis en decembro al Sichuan laŭ la vojo Wuchidao. En la sudokcidento Zhuge Liang praktikis serion da politikoj favore al la nacia unuiĝo, tiel ke la tiea situacio stabiliĝis. En la daŭro de ses monatoj post kiam la trupoj gvidataj de Zhuge Liang eniris Yunnan, gravaj bataloj okazis ĉefe ĉe Wuchidao. Eĉ hodiaŭ ankoraŭ cirkulas anekdotoj pri Zhuge Liang kaj liaj trupoj inter multaj nacimalplimulto.

LA MALNOVA LOKO DE CUAN-FAMILIO

Cuan-familio estis potenca en sudokcidenta Ĉinio. Ĝi regis orientan Yunnan dum 400 jaroj. Post ĝia dekadenciĝo iuj ĝiaj membroj migris al Baoshan kaj Tengchong en okcidenta Yunnan laŭ la Suda Silka Vojo. Ili prenis Cun kiel sian familian nomon. Hodiaŭ en Qujing neniu prenas Cuan kiel sian familian nomon. La steleo Cuanbaozi estas unika signo postlasita de Cuan-familio. Iun tagon en 1852 Deng Erheng, gubernatoro de Qujing, trovis en sia kuirejo surskribon sur toŭfu. Post longa pri-rigardo li konsta-

tis, ke ĝi estas stelea gravuraĵo. Li do demandis kuiriston pri tio kaj informiĝis, ke iu etvendisto de toŭfu malkovris sur sia kampo steleon, portis ĝin hejmen kaj prenis ĝin kiel ilon por prepari toŭfun. Ĝi estas nenio alia ol la steleo Cuanbaozi. Kun granda ĝojo Deng Erheng ordonis transporti la steleon al sia hejmo. Cuan Baozi estis prefekto de Jianning kaj mortis en la aĝo de 23 jaroj. Li faris neniun gravan kontribuon. Oni starigis al li steleon nur por supraĵe laŭdi lin. La steleo okupas gravan lokon en la ĉina kaligrafio. La ideogramoj sur ĝi estas fortstrekaj. Ĝi servas kiel grava materialo por esplori la evoluon de la skribformo de la ĉinaj ideogramoj. Ĝi estas bonvenigata de multaj kaligrafoj kaj frotkopiantoj. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991


Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
FR Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11.50 18.50 26.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.80 12.40 17.50



Gongistinoj

Weifeng- perkutinstrumentaro

Fotoj de LIU YINQING

La nomita instrumentaro estas populara en suda Shanxi, Ĉinio, kun densa loka gusto. Perkutata, ĝi sonas sonore kaj impresas impone. Tial ĝi ricevis la nomon (ĉinlingve weifeng signifas imponecon).

La instrumentaro havas historion de ĉ. 4 000 jaroj. Ĝi konsistas el unu tamburo, du malgrandaj cimbaloj, du grandaj

cimbaloj kaj ok gongoj. Antaŭe ĝi estis perkutata de dekkelkaj homoj, sed nun la nombro de perkutantoj estas sufiĉe granda. En la pasinta jaro pli ol 300 kamparanoj de Linfen formis grupon de perkutantoj kaj partoprenis en grandioza prezentado sur Tian'anmen-placo en Pekino por celebrado de la 40-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

Prezentado sur Tian'anmen-placo





Cimbalisto

Tamburado



Tajŝanghŭang kaj Ningshou-palaco


Teksto de MU YI

Fotoj de GU HUA kaj LUO WENFA

EN la historio de Ĉinio estis sistemo de Tajŝanghŭang. Tajŝanghŭang estis honora titolo donita al imperiestro, kiu abdikis la imperiestrecon al sia filo aŭ frato, aŭ formale cedis la tronon sed fakte ankoraŭ tenis la regadon. Kutime abdiko okazis pro granda aĝo de la imperiestro. Sed kelkfoje situacioj devigis la abdikon, kiam filo aŭ frato de imperiestro jam surtroniĝis. Pro la malsameco de la situacioj de la abdiko, la abdikintaj imperiestroj vivis komplete malsamajn vivojn: iuj daŭre tenis la regadon, aliaj vivis komforte, dum triaj vivis mizere kiel malliberulo.

En la Imperiestra Palaco vivis 24 imperiestroj de la dinastioj

PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



N-ro 20 en la plano signas Ningshou-palacoon.

Ming (1368-1644) kaj Qing (1644-1911), kaj du el ili estis Tajŝanghŭang. La unua estis imperiestro Zhu Qizhen de Ming-dinastio. En 1449 li estis kaptita de malamikoj en milito. Lia frato surtroniĝis kaj donis al li nominalan titolon. La alia Tajŝanghŭang estis imperiestro Qianlong de Qing-dinastio. Li estis daŭre potenca post abdiko de la reganteco.


Qianlong estis unu el la eminentaj imperiestroj de Qing-dinastio. Lia avo imperiestro Kangxi regis 61 jarojn, kaj li proklamis ĉe sia surtroniĝo, ke li regos malpli ol 61 jarojn. Qianlong vivis 89 jarojn, plej longe ol la aliaj imperiestroj de Qing-dinastio. Por plenumi sian promeson, li transdonis en 1796 la tronon al sia filo kaj faris sin Tajŝanghŭang.

Por vivi komforte post sia detroniĝo, jam en 1773 Qianlong komencis rekonstruigi por si Ningshou-palacoon en la nordorienta parto de la Imperiestra Palaco. La rekonstruado daŭris 5 jarojn. Ĝi estas memstara palaco konstruita laŭ la strukturo de la Imperiestra Palaco, ke akso trairas la tri antaŭajn halojn kaj tri postajn palacojn. La palaco konsistas el tri partoj. Kontraŭ Huangji-pordo de la meza parto sidas la fama naŭ-draka ekranmuro. Interne de la pordo estas Ningshou-pordo. Tie estas Huangji-halo, kie Tajŝanghŭang akceptis korteganojn. Post la halo estas Ningshou-palaco. Pli poste estas Yangxing-halo kaj Leshou-

palaco servantaj kiel loĝejoj de Tajŝanghŭang kaj liaj edzinoj. La okcidenta parto estis Ningshougong-ĝardeno, alinomata Qianlong-ĝardeno. En la ĝardeno estas multaj pavilonoj, turoj kaj diversaj konstruaĵoj dense ombrataj. La orienta parto konsistas el granda scenejo Changyinge, pavilono Yueshi kaj aliaj konstruaĵoj. La orienta kaj okcidenta partoj estis loko por amuzo kaj ripozo de Tajŝanghŭang. La palaco okupanta 46 000 kvadratajn metrojn estas ĉirkaŭita de ruĝaj muroj. Oni povas diri, ke ĝi estas palaco en palaco.

Kvankam imperiestro Qianlong abdikis la tronon, sed li neniom forlasis la potencon. Li daŭre loĝis en Yangxin-halo por praktiki regadon. Li dekretis: "Kvankam mi transdonis la regadon, tamen mi ne povas min deteni de la gravaj aferoj de la ŝtato, nomumado kaj decido de politikoj. Mi ankoraŭ devas doni instruon." Kvankam li aĝis jam pli ol 80 jarojn, tamen havis bonan sanon kaj apetiton, kaj aspektis pli juna ol li fakte estis. Sed li "fariĝis pli kaj pli forgesema, ofte forgesas okazaĵon eĉ tre freŝan". Imperiestro Jiaqing estis tre obeema antaŭ li. Kiam Tajŝanghŭang iris vojaĝi, ĉasi, kulti prapatrojn kaj budhojn, imperiestro Jiaqing ĉiam sekvis lin kaj obeis al ĉiu lia decido, sen ajna memstareco.

Por soleni la abdikon, imperiestro Qianlong ordonis aranĝi bankedon en Huangji-halo kaj Ningshou-palaco honore al miloj da grandaĝuloj. La invititoj estis




Ningshou-pordo

agantaj kaj emeritaj korteganoj, altrangaj oficistoj, princoj kaj fremdlandaj diplomatoj en aĝo de pli ol 65 jaroj. La palaco Ning-

shou estis feste dekorita kaj la 800 tabloj estis lokitaj rigore laŭ la klasoj, dum la bankedejo por Tajŝanghŭang kaj la nova imperi-

estro estis kovrita per flava silkaĵo. Sub la alero de la halo ludis orkestro kaj stokiĝis multe da ornamaj jadaĵoj kaj donacaĵoj de imperiestroj.

La naŭdraka ekranmuro post Huangji-pordo



Kiam la invititoj ĉetabliĝis, la abdikinta imperiestro Qianlong kaj lia filo imperiestro Jiaqing eniris en Huangji-halon kaj ĉetabliĝis en muziko, dum la invititaj altranguloj ekster la halo devis genuiĝi trifoje kaj ĉiufoje kun trifoja kapfrapo kun la tero kaj la aliaj banked-partoprenantoj samtempe sin klinis por saluti. Kiel grandioza vidaĵo, ke kvinmil personoj festenis en akompano de muziko kaj kantado. Sed ĉiufoje kiam Tajŝanghŭang kaj imperiestro tostis aŭ proponis regalajon, la festenantoj malgraŭ la granda aĝo devis genuiĝi sur sia loko kaj frapi la kapon kun la tero, por esprimi dankon al la honoro. Vere laciga rito por tiuj maljunuloj. La bankedo finiĝis en la momento de foriro de Tajŝanghŭang kaj imperiestro. Estis notite, ke 10 el la festenantoj en la aĝo de pli ol 90 jaroj estis honoritaj de tosto de Tajŝanghŭang kaj imperiestro, kaj la plej aĝa el ili estis 106-jara.

Dum la tri jaroj post abdiko de la imperiestro, Qianlong ĉiam sidis ĉe la potenco pli granda ol



La scenejo de Changyinge

imperiestro Jiaqing, kiu ŝajnis tre obeema al la patro. Sed kiam mortis Qianlong en 1799, imperiestro Jiaqing tuj ordonis aresti en la sekvanta tago Heshen, kortegano multe favoratan kaj konfidatan de Qianlong, kaj post 14 tagoj li kondamnis Heshen al morto pro 20 krimoj. Tio pruvis malakordojn inter la imperiestro kaj Tajŝanghūang, malgraŭ ke la imperiestro neniam spitis la patron dum lia vivo.

En la lastaj jaroj de Qing-dinastio, imperiestra patrino Cixi

ekŝatis Ningshou-palaco kaj enloĝiĝis en la palaco, spitante la rutinon de la kortego, ke la edzino de forpasintaj imperiestroj povas loĝi nur en Cining-palaco. Cixi faris sin virina Tajŝanghūang. Por celebri la 60-an datrevenon de ŝia naskiĝo, la kortego elspezis 600 000 taelojn da arĝento por rekonstrui Ningshou-palaco. La nuna palaco ankoraŭ konservas la aspekton postlasitan de la rekonstruado.


Menciinda estas puto ĉe la posta pordo de la ĝardeno de

Ningshou-palaco. Ĝi estas tute ordinara. En 1900, kiam la Oklanda Alianca Armeo invadis Pekinon, Cixi terurite fuĝis okcidenten kune kun imperiestro Guangxu. Antaŭ sia foriro ŝi ordonis al eŭnukoj puŝi en la puton la imperiestran edzinon Zhenfei, kiu subtenis la imperiestron en lia politika reformado. Tiam ŝi agis nur 25 jarojn. Oni prefere nomas ĝin Zhenfei-puto por memorigi pri la juna imperiestra edzino, kiu viktimiĝis por la politika reformado. ■



Zongxi-kiosko en Ningshougong-ĝardeno

Taso-flosanta kanaletoj en Ningshougong-ĝardeno



La soklo por flagstango antaŭ Huangji-halo



ENHAVO**2 Solena festado de la 40-jara jubileo de EPC**

9 Gaja internacia vespero

13 Gratulaj vortoj por la 40-jara jubileo de EPC

17 Esperanto, perilo de internaciaj scienc-teknikaj interŝanĝoj19 **ESP-NOVAĴOJ**31 **POR KOMENCANTOJ:**

Sorto

36 Ĉinaj poŝtmarkoj por la azia sportkunveno

44 **SUR NIA LIBROBRETO:**

Kolektaĵo amuza kaj pensiga

37 "Hejmo" de aziaj sportistoj39 **INTERVJUOJ:**

Antaŭ la 11-a Azia Sportkunveno

30 "Eminentaj Popolaj Servantoj"

20 "Urbo" en montaro

45 **LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (16):**

Tri urbetoj en orienta Yunnan

52 **LA IMPERIESTRAL PALACO (11):**

Tajŝanghŭang kaj Ningshou-palaco

42 **ANTIKAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:**

De fiŝrigardado ĝis sonĝo pri papilio

27 **POEMO • KALIGRAFAĴO • PENTRAĴO:**

Pri "Krizantemo"

32 Yang Guanghua kaj liaj pentraĵoj

26 **POR VIA SANO:**

Ĉina ĉigong-o

23 **AMUZOJ**24 **NIA MONDO:**

La Rikolta Festo de Barbadoso

50 Weifeng-perkutinstrumentaro

35 **KORESPONDI DEZIRAS**34 **KURANTAJ AFEROJ****SUR LA KOVRILO:**

Ĉinaj kaj alilanda esperantistoj en la te-kunveno por la 40-jara jubileo de EPC

Foto de EPC-raportisto

SUR LA DORSKOVRILO:

Enhavo

**LOKOJ
MENCITAJ EN ĈI
TIU NUMERO**

1. Tianjin
2. Yong'an
3. Sichuan-provinco
4. Dandong

